



# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Novembro 2019 n-ro: 47



## Merhaba,

Sisli günler başladı, kış geliyor... İşte Kasım 47. sayımız ! Bu sayımızda sizlere okumanız için gene her zamanki gibi birbirinden çok farklı ve güzel yazılar seçtik. İşte bunlardan bazıları:

- Maalesef Ekim ayında Zamenhof'un torunu Zaleski-Zamenhof'u kaybettiğimize dair bir yazı.
- Tempo Sigelita köşesinde Konuralp Sunal'ın "Mallonga Renkonto" adlı filmin yorumu.
- Spiros Sarafian'dan "Pariso kaj Ojnona" adlı mitolojiden bir hikaye.
- "La Ondo" adlı derginin sene sonundan sonra artık yayınlanmayacağını anlatan bir yazı.
- Coşkun Atak'tan bir çocuk masalı "Ĉiela Fabelo".
- Hori Jasuo'dan Japon kentler Hiroşima ve Nagasaki'de yaşanan atombombası trajedi anlatıları.
- ... ve daha bir çok yazı ...


## Hepinize iyi okumalar !

## Saluton,

Nebulaj tagoj jam komenciĝis, vintro alvenas... Jen nia 47-a novembra numero ! En ĉi ti numero ni denove kolektis por vi diversajn kaj belajn tekstojn por legi. Jen kelkaj el ili:

- Teksto pri la bedaŭrinda forpaso en oktobro de la nepo de Zamenhoj, Zaleski-Zamenhof.
- En la rubriko Tempo Sigelita, la artikolo de Konuralp Sunal pri la filmo "Mallonga Renkonto".
- "Pariso kaj Ojnona", rakonto el mitologio verkita de Spiros Sarafian.
- Artikolo pri la foriro de la revuo "La Ondo" en la fino de ĉi tiu jaro.
- Infanrakonto de Coşkun Atak "Ĉiela Fabelo".
- Tragediaj rakontoj pri la atombomboj en urboj Hiroşimo kaj Nagasako de Japanio.
- ... kaj multaj aliaj tekstoj ...

## Bonan legadon al ĉiuj !



### TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com


Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

## Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Forpasis la Nepo	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Tempo Sigelita	4
PARISO kaj OJNONA (ΠΑΡΙΣ και ΟΙΝΩΝΗ)	5
Mi pripensis...	9
Peto de simieto	9
La Ondo de Esperanto foriras	10
Mesaĝo de UEA okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj - 24 oktobro 2019	11
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 18)	12
Dr. Isitobi Kozoŭ	13
La pianistino	14
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	16
Franco KAFKO (Franz Kafka)	17
Okazo en Buso	18
Pri fantomoj	19
Tranĉilakrigisto	19
Ŝercoj	20
Kurcvortenigmo	20
El la libro de "Dao de Jing" (38)	21
Poeziaĵoj de Ilir Zhiti	21
Eva survoje al la kono	22
Ĉiela Fabelo (infanrakonto)	23
Kiel Mihok instruis angle	23
Dimanĉa poezio: Ludoviko Zamenhof	28
Rifuĝinta kato - hungara popolfabelo	29
Scivolulo	29
Tragedio pro la atombomboj	30
Ni lernu Esperanton!	31
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32

## Kursoj



Finiĝis la kurso de Esperanto en la lernejo Ŭskŭdar Amerikan Lisesi en Istanbulo. En somero ne okazos aliaj kursoj.


Murat Ŭzdizdar pensiĝis el Ŭskŭdar Amerikan Lisesi lernejo, do ekde venonta jaro la ŝanco daŭrigi EO klubon en ĉi tiu lernejo, bedaŭrinde, estos malalta.

## Forpasis la Nepo

Kun malfeliĉa koro ni anoncas al la esperantistaro, ke

**Ludoviko Kristoforo ZALESKI-ZAMENHOF, la Nepo en sia 95-a jaraĝo forpasis la 9-an de oktobro 2019, en Parizo.**

Louis-Christophe (Ludoviko Kristoforo) ZALESKI-



ZAMENHOF (naskiĝis la 23-an de januaro 1925 en Varsovio, forpasis la 9an de oktobro 2019 en Parizo) - estis la nepo de Ludoviko Lazaro Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Laŭprofesie li estis inĝeniero.

Li studis en Varsovia Politekniko 1946 – 49 kaj diplomiĝis kiel inĝeniero pri konstruado, sekve doktoriĝis pri teknologio de streĉbetono. En 1959 li translokiĝis al Parizo kaj daŭrigis sian profesion karieron en Francio kaj aliaj landoj, realigante konstruaĵojn sur tero kaj maroj. Lia alia kampo de laboro estis didaktiko en la Arkitektura Altlernejo en Parizo kaj Politekniko de Milano. Li publikigis multajn artikolojn kaj librojn pri sia fako. Post la emeritiĝo en 1993 li okupiĝis pri faka konsultado, ĉeestis sciencajn konferencojn kaj kongresojn, inkluzive de Esperanto-kongresoj.

Pliajn detalojn pri lia riĉa vivo bv. legi en la Wikipedia prezento, verkita de Roman Dobrzyński.

**[https://eo.wikipedia.org/wiki/Louis-Christophe\\_Zaleski-Zamenhof](https://eo.wikipedia.org/wiki/Louis-Christophe_Zaleski-Zamenhof)**

Nia redakcio sincere kondolencas al la familio, speciale al la filino Margaret Zaleski-Zamenhof, nia aktiva membro kaj kontribuanto.

Fonto: <https://edukado.net/novajhoj?id=800>

## Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj

landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.*

## Esperanto-Sumoo



Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj:

januaro, marto, majo,

julio, septembro, kaj novembro.

Unu konkurso daŭros 15 tagojn.

Dum la luktokonkurso luktistoj estas grupigitaj en 3 grupoj.

Luktistoj, kiuj venkis perfekte 15 venkojn en la antaŭa sumoo, apartenas al rango A, kaj luktistoj, kiuj ne venkis perfekte, apartenas al rango B, kaj novaj partoprenantoj apartenas al rango C.

### Luktmaniero:

1) Elektu libron, kiun vi legos dum tiu konkurso.

2) Decidu kiom da paĝoj vi legos por unu tago laŭ via kapablo.

3) Laŭ la irado de vera Sumoo-konkurso, ni luktadas. Se vi legas pli ol promesitaj paĝoj ĝis la noktomezo de tiu tago, vi akiras "o" venkon, se ne, "x" malvenkon. Tiamaniere vi luktas kun la libro dum 15 tagoj. Vi ne luktas kontraŭ aliaj luktistoj, sed kontraŭ vi mem.

4) Venko estos markita per litero "o", malvenko per litero "x" kaj nepartopreno per signo "-".

Jen la regularo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/regularo.html>

\* \* \*

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia\\_Esperanto-Sumoo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo)

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

## UEA



N-ro 831 (2019-10-24)

**Mesaĝo de  
Universala  
Esperanto-Asocio  
okaze de la Tago de**

**Unuiĝintaj Nacioj, 24 oktobro  
2019**

[Kun afabla peto republikigi ĝin en viaj lokaj kaj landaj paperaj gazetoj kaj aperigi ĝin en viaj aliaj komunikiloj. Dankon!] [...]

N-ro 830 (2019-10-10)

**Forpasis Louis-Christophe  
Zaleski-Zamenhof (1925-2019)**

Louis-Christophe (Ludoviko Kristoforo) ZALESKI-ZAMENHOF (naskiĝis la 23-an de januaro 1925 en Varsovio, mortis la 9-an de oktobro 2019 en Parizo) estis doktoro inĝeniero pri surlanda kaj enmara konstruado, aparte pri premŝtalbetono, nepo de L. L. Zamenhof. [...]

N-ro 829 (2019-10-01)

**Opero en Esperanto**

La 27-an de septembro 2019 (je la 19:00 CEST, 17:00 UTC) la Nacia Teatro de Prago eksurscenigis la operon Sternenhoch kadre de la Internacia Teatra Festivalo en Nitro (de la 27-a de septembro ĝis la 2-a de oktobro 2019). [...]

N-ro 828 (2019-09-26)

**Deklaro de Universala  
Esperanto-Asocio okaze de la  
Monda Turisma Tago, 27  
septembro 2019**

Monda Turisma Tago de UN, kiun oni festas la 27-an de septembro ĉiujare, estas okazo por observi la signifon de turismo kiel rimedo por renkontigi homojn trans regionaj kaj landaj limoj kaj kultivi en ili spiriton de reciproka respekto kaj kompreno. [...]

## TEJO



**IJK 2021 en via  
lando!**

Kandidatiĝu kaj organizu kune kun

TEJO la 77-an Internacian Junularan Kongreson en via lando!

Por ke kandidatoj sentu sin pli certaj kaj kuraĝaj ni proponas du etapojn por sendi al ni viajn proponojn. [...]

**Plibonigu vian Esperanton kun  
Ekparolu!**

Ĉu vi havas malmultajn eblojn paroli Esperanton?

Pere de la projekto Ekparolu! de Edukado.net vi povas havi verajn konversaciojn kun spertaj esperantistoj el la tuta mondo kaj plibonigi vian parolkapablon. Senpage! [...]

**Estu parto de la Elekta  
Komisiono de TEJO**

La Elekta Komisiono estas Organo de TEJO, kies ekzisto kaj funkcio estas priskribita de la Reglamente pri Elekto de Estraranoj. Ĝia tasko estas kolekti kandidatiĝojn por la estraro (kaj ankaŭ mem alparoli eblajn kandidatojn), prijuĝi la kandidatojn kaj prezenti al la komitato strukturitan proponon por elekto de nova estraro. [...]

**TEJO partoprenis kunsidon de  
Forumo Junulara Eŭropa en  
Bruselo**

TEJO partoprenis kunsidon de membroj de FoJE – Forumo Junulara Eŭropa (European Youth Forum) la 8-an de septembro en Bruselo por pridiskuti la strategian laborplanon. [...]



## Leteroj de niaj legantoj



Antaŭ dankon estimataj pro via zorgado al la Turka Stelo! Mi atendas la novembran numeron. Mi ĝojas. Koran dankon!

**Kacu Matoba** el Japanio



Kara Konuralp,  
Mi ŝatas legi viajn artikolojn pri kino en "Turka Stelo".

Ĉu vi ankoraŭ frekventas ofte la kinejojn?

**Pierre Jaffré** el Francio



"Turka Stelo" ! La oktobra numero aperis kaj estas elŝutebla. Ĉiam enhavoriĉa.

<https://esperantoturkiye.wordpress.com>

<https://esperantoturkiye.wordpress.com/category/dergi-revueto/>

**Henri Masson** el Francio (el facebook'o)



Bonan matenon, Mi bone ricevis la oktobran numeron de Turka Stelo, Kiel ĉiam mi legos ĝin plezure, Amike

**Bardhyl Selimi** el Albanio

## TEMPO SIGELITA

### MALLONGA RENKONTO (BRIEF ENCOUNTER-1945)

**D**avid Lean estis unu el la plej grandaj filmo-direktoroj de la lasta jarcento. Li estas konata kun la filmoj nomitaj "Laŭrenco de Arabujo", "Filino de Ryan", "Pasejo al Hindujo", "Doktoro Zhivago", "La Ponto sur rivero Kwai". Sed, eble, ĉi tiu filmo pri kiu mi rakontos al vi ne estas bone konata. Ĉi tiu filmo apartenas al lia frua periodo bazita sur la unu-aga teatraĵo ("Still Life") de Noel Coward, kiu estis el la gvidaj reprezentantoj de la Brita Teatro.



En la filmo oni rakontas tre simplan amrakonton. Kaj la tuta beleco de ĉi tiu amrakonto estas kaŝita en ĝia simpleco.

En la komenca sceno vidiĝas du vagonaroj kiuj iras en kontraŭaj direktoj. En la fono aŭdiĝas tiu fascina "dua piano koncerto" de Rachmaninoff. Ni eniras en nigra-blankan vojaĝon tra la vaporoj de tiuj du vagonaroj. La posedantino de la kafejo en la stacidomo kaj la kondukto komencas paroli. Ordinara tago, ordinaraj homoj... Ni sekvas la dialogojn de ĉi tiuj malĉefroluloj paralele al la dialogoj de la ĉefroluloj. Kiom malĝojigas la ĉefroluloj, tiom ĉi tiuj du malĉefroluloj amuzas. Noel Coward, la verkisto - ankaŭ la produktanto de la filmo - kaj la reĝisoro kreis bonan ekvilibron inter enamiĝo kaj komedio.

## verkis kaj sendis Konuralp Sunal el Turkujo

*"La vivo daŭras Sinjoro Godby..."*



Ĉi tiu linio estas referenco por malĝojaj disigoj. Kompreneble la kondukto Godby kaj la posedantino de la kafejo Myrtle ne konscias pri la rilato de la amantoj. Sed tio estas kiel marko de la skriptisto. Amo povas finiĝi, tamen vivo daŭras. Iom poste la kamerao turnas sin al la silenta paro kiu sidas ĉe malgranda tablo. Ĝuste tiam iu parolema virino alvenas kaj rompas la silenton de la senesperaj amantoj. De ĉi tiu punkto la intrigo malvolviĝas kaj ni revenas al la supro. Kuracisto Alec Harvey forlasas ilin kaj Laura revenas hejmen kun la parolema virino. Laŭra pensas kaj rakontas per sia propra interna voĉo, kiel ŝi faros tra la tuta filmo. Kiam ŝi alvenas hejmen, Fred, sia edzo informas pri ia problemo inter siaj du infanoj. Ŝi supreniras al ilia dormoĉambro kaj aŭskultas ilian problemon, sugestas al ili dormi kaj revenas al la loĝĉambro. La geedzoj parolas... La viro (Fred) rimarkas, ke la virino ŝajnas malfeliĉa. Demandas ŝin pri kio temas la problemo kaj insistas pri respondo. Sed ŝi kaŝas la problemon. Fred komenciĝas solvi krucvortenigmon kiel kutime kaj baldaŭ Laura demandas lin, se ŝi povas meti muzik-diskon sur la diskaparaton kaj denove aŭdiĝas kelkaj muzikaj partetoj de la Rachmaninoff-Koncerto en la fono.

Laura Jesson pripensas al si mem rigardante sian edzon, Fred. Ĉu ŝi malkaŝu sian sekreton?

*"Fred, kara Fred. Estas multe, ke mi volas diri al vi. Vi estas la sola en la mondo kun sufiĉe da saĝo kaj ĝentileco por kompreni tion. Sed nur temas pri ies alia historio kaj ne mia. Kiel ĝi estas, ke vi estas la sola homo en la mondo, al kiu mi neniam povas rakonti. Neniam, neniam. Ĉar eĉ se mi atendus ĝis ni maljuniĝos, kaj diskuti tion tiam, kiel maljunaj homoj, vi trarigardus reen tra la jaroj kaj ankoraŭ vundiĝus. Sed*



kara, mi ne volas, ke vi vundiĝu. Vi vidas, ni estas feliĉa geedziĝinta paro kaj ni neniam forgesu tion. Jen ĉi tiu estas mia hejmo. Vi estas mia edzo. Kaj miaj infanoj estas en la supra etaĝo en la lito. Mi estas feliĉa edziniĝinta virino - aŭ mi estis, pli ĝuste, antaŭ kelkaj semajnoj. Jen mia tuta mondo, kaj sufiĉas, aŭ pli ĝuste ĝi estis sufiĉa ĝis antaŭ kelkaj semajnoj. Sed, ho! Fred, mi estas tiel malsaĝa. Mi enamiĝis. Mi estas ordinara virino. Mi ne pensis, ke tiaj aferoj povus okazi al ordinaraĵ homoj.”

Jes, du ordinaraĵ, mezklasuloj, kiuj havas sufiĉe stabilajn vivojn, renkontiĝas en ĉi tiu stacidomo koincide. En la kajo, la vagonaro pasante, polvo trafas la okulon de la virino. Ŝi eniras en la kafejon, kaj petas akvon por lavi sian okulon. Viro, kies vizaĝon la virino konis antaŭe, alproksimiĝas kaj diras, ke li estas kuracisto, kaj ke li povas helpi. Li forigas la polveron, sed sampteme malfermiĝas la pordon al enamiĝo.

Unufoje semajne... ĉiuj iliaj eblecoj vidi unu la alian... iri al la kinejo... trinki tason da kafo... vespermanĝi kune... estas ĉio, kion ili povas fari. Sed kio pri sekso rilato? Ili kunvenas en la hejmo de Stefano (amiko de kuracisto Alec), sed Laura ne povas eviti sin senti kulpa. Ankaŭ ŝi hezitis veni ĉi tien antaŭe. Subite Ili aŭdas la klakadon de la seruro kaj konstatas, ke Stefano envenas. Laura eskapas la apartamenton el la malantaŭa pordo. Se ŝi povus resti iom pli da tempo, ĉu ili povus seksumi? Mi pensas, ke NE. Ĉar se ili farus tion, ĉi tiu romantika bildo detruigus. Probable la morala komprenemo de la tempo ne permesus tian scenon eĉ se ĝi estus ne tre obscena. Kompreneble, sekso ĉiam ekzistis en la homa historio, sed tiaj estis tiam la tagoj... Rigardante de ĉi tie kaj ĉi-momente ĝi ŝajnas esti mola kaj eleganta rakonto. La direktoro nutris kaj intensigis la bildojn kaj lerte uzis lumojn kaj ombrojn en la filmo.

En la lasta tago de ilia disiĝo, ili sidas ĉe la kafejo de la stacidomo kaj parolas. Jen la dialogo:

Laura : *Mi volas morti.*

Alec : *Se vi mortas, vi forgesos min. Mi volas esti memorata.*

Laura : *Jes, mi scias. Ankaŭ mi...*

Baldaŭ la babilema virino venas. Ni spektis la eventojn kaj ni revenas al la malferma sceno. Alec baldaŭ foriras. Laura estas laca de ĉi tiu virino. Ŝi subite forkuras eksteren kaj volas ĵeti sin antaŭ la vagonaro. Ŝi similas al Anna Karenina... Sed ŝi ne povas fari tion. Ŝi diras, ke ŝi ne estas tiom kuraĝa.

Laura : *Mi ŝatus diri, ke tio, kio malebligis min ĵeti*

min antaŭ la vagonaro estis pensi pri vi kaj la infanoj. Sed ĝi ne estis. Mi ne scias sed eble mia deziro morti estis por ne plu senti ion... por ne plu esti malfeliĉa... Sed mi revenis.

Poste ni revenas al la salono. La momento, en kiu ŝi estas kun sia edzo. Ni vidas la profundan malĝojon en ŝiaj okuloj. Fred alproksimiĝas kaj demandas tenere :

Fred : *Laura?*

Laura : *Jes, kara...*

Fred : *Kiu ajn estis via sonĝo, ĝi ne estis tiom feliĉa, ĉu ne?*

Laura : *Ne.*

Fred : *Ĉu mi povas fari ion?*

Laura : *Jes, Fred, vi ĉiam helpas.*

Fred : *Vi estis tre malproksime.*

Laura : *Jes.*

Fred : *Dankon pro reveni al mi.*

Senkulpa amo viviĝis kaj finiĝis. Kiel sonĝo. Sed ĝi ne estis sonĝo ĉar Alec ne revenos. Li fariĝos kuracisto en Sud-Afriko.

Edzo kaj edzino brakumas unu la alian. Amo estas entombigita en la virina koro. La "Sankta Familio" daŭras. Alec kaj Laura ne forgesos unu la alian ĝis ili mortas. Ĉi tiu rakonto, kiun David Lean rakontas per simpla kina lingvo, estas unu el la plej neforgeseblaj filmoj.

La ĉefroluloj Celia Johnson (Laura Jesson) kaj Trevor Howard (kuracisto Alec Harvey) estas gigantaj aktoroj... realaj aktoroj. Kaj la famaj aktoroj de tiu periodo Stanley Holloway (la kondukto Albert Godby) kaj Joyce Carey (la posedantino de la kafejo Myrtle Bagot) ludas siajn rolojn perfekte.

"Mallongaj renkontoj" estas filmo por tiuj, kiuj volas spekti maldolĉan kaj troigan filmon, sed kiu ne emas melodrami... jen ligilo por spekti la filmon :

<https://www.youtube.com/watch?v=HCt8S-Aio5M>

Hieraŭ vespere dum mi skribis ĉi tiun tekston mi aŭskultis la saman koncerton de Rachmaninoff en iu el la radio-kanaloj. Ĉu pro koincido?

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal** el Turkujo  
24 oktobro 2019, Büyükkada, Istanbulo

**E**stas ja en la tuta mondo konate, ke la plej granda, plej longa, katastrofa kaj mortokaŭza milito de la tre antikvaj epokoj, estas tiu, okazinta en Trojo (Τροία), la mond-konata Troja Milito (Τρωικός Πόλεμος). Dum multaj jam jarmiloj, ankoraŭ ĝis nun, la homoj lernas kaj diskonigas la famon, ke sola kaŭzo de la terura milito estis unu eksterordinare bela kaj alloga virino, la konata bela Helena (ωραία Ελένη).



Ne nur ĉar mi amas la virinojn, sed ĉar mi estas homo justa, mi devas pledi por la fatala belulino kaj se ne tute renversi, almenaŭ moderigi la ĉiesan maljustan opinion. En la nuna tempo ni kutimas tre ĝuste diri proverbe, ke la tango postulas du partnerojn; mi aldonas, ke ankaŭ la amoro kaj la adulto postulas du partnerojn! Do, ni lasu Helenan, ni jam diris multon pri ŝi, ni prezentu la partneron, la duan kaŭzanton de la granda katastrofo.

Kompreneble mi parolas pri Pariso (Πάρις), unu el la filoj de la troja reĝo Priamo (Πρίαμος), kiu forrabis kaj kondukis al Trojo la reĝinon de Sparto (Σπάρτη), Helenan, kaj kaŭzis la indignon de la Helenoj kaj ties ekspedicion kontraŭ Trojo.

Estas vere, ke antaŭ la naskiĝo de Pariso, la dioj estis avertintaj la trojan reĝan paron, ke tiu filo kaŭzos nedezirindan sortoturnon, eble la tutan detruon de la longe feliĉa Trojo. La reĝino Hekuba (Εκάβη) estis graveda, kiam ŝi vidis en inkubsonĝo, ke ŝi naskis flamantan kaj sangogutantan torĉon, kiu bruligis Trojon. Ajzako (Αΐσακος), bastarda filo de la reĝo kaj la plej bona sonĝoeksplikisto de la lando, konsilis la reĝon mortigi la bebon, tuj post ties naskiĝo. Priamo ne povis ignori tian klaran, tute certan averton, sed li ne povis mem mortigi sian infanon, do, tuj post la naskiĝo, liveris ĝin al servisto, kiu, laŭ la ordono, forlasis ĝin en fora, kruta kaj dezerta monta loko. Mirakle, la bebo ne mortis, oni diradis, ke estis ina urso, kiu mamnutris ĝin, ĝis kiam, tute hazarde, trovis ĝin montano, iu Arĥelao (Αρχέλαος), brutpaŝtisto kaj

bredisto de taŭroj. Tiele, la infano pasigis sian infanaĝon en foraj montaj lokoj, inter la paŝtistoj, li iĝis tre lerta taŭrobredisto kaj dank' al la bona eduko kiun ĝi ricevis de la simplanima, sed bonkora kaj honesta adopt-patro, ĝi iĝis unu bonkondata, afabla kaj brava junulo. Tre frue li iĝis estro de siaj samaĝuloj en la junulaj ludoj kaj aventuroj, li estis forta, tamen ne tre laborema kaj penema. Malgraŭ tio, kiam fremdaj, sovaĝaj ĉasistoj atakis la montan restadejon de la paŝtistoj celante ŝteli brutojn kaj virinojn, Pariso estis la unua, kiu kuraĝe alfrontis kaj forpelis ilin. Post tiu lia bravaĵo, liaj kunuloj donis al li lian duan nomon, Aleksandro (Αλέξανδρος), kiu en la helena lingvo signifas "tiu, kiu repuŝas la kontraŭulojn". Malgraŭ tiu okazaĵo, la vivo de la juna paŝtisto fluis glate, pace kaj feliĉe.

Feliĉe, ne nur ĉar li ĝuis la belan medion, ne nur ĉar li kunvivis kun bonaj, honestaj kaj virtaj homoj, sed ĉar en lia vivo gravan rolon tenis Ojnona! Ka tiu Ojnona estis belega junulino, la unua kaj sola amatino de Pariso, en liaj unuaj junulaj jaroj. Ojnona estis nimfo, filino de la rivera duondio Cebreno (Κεβρήν), kaj vivis en la arbaroj de Ido (Ίδη), la plej alta monto de la troja lando. Ojnona estis ne nur tre bela junulino, sed tre bonkora, kompatema kaj helpema virino, tre amata al ĉiuj montanoj kaj ne nur al tiuj. Ŝi havis tre specifan kapablon, ŝi tute bone konis ĉiujn herbojn, ŝi sciis la kuracefikon de ĉiu drog- kaj kuracherbo, kaj tiele ŝi povis prepari la plej efikan sanigaĵon por ĉiu okazo kaj kuraci tute kontentige la malsanulojn, kiuj petis pri ŝia helpo. Tio, tamen, kion Ojnona sciis plej bone, estis la sanigo de ĉia vundo. Por ĉia vundo, morda, pika, unga, skrapa, por ĉia ajn vundo, ŝi havis la taŭgan drogherbon kaj la tute efikan terapion. Estas, do, kompreneble, kial la junulino, kiu tute bonvole kaj senprofite oferis al ĉiuj homoj siajn servojn, estis tiel amata.

Pariso kaj Ojnona renkontiĝis en la arbaro, kie ambaŭ vivis, kiam ili estis ankoraŭ en la pubereco, sed tuj post la unua rigardo, ili pasie enamiĝis inter si. Ili ambaŭ ĝuadis longe sian amon, post kelka tempo ili geedziĝis laŭ la kutimoj de la regiono kaj ili akiris unu filon, Koriton (Κόρυθος). Nu, Pariso, la bela, juna paŝtisto estis unu benita de la dioj, vere feliĉa, juna viro.

Estis la antaŭtagoj de la plej granda, jara festo-foiro, kiu okazis solene en la ĉefurbo, sub la aŭspicio de la reĝo mem. En la programo de la granda foiro estis atletaj kaj aliaj ludoj kaj konkursoj, en kiuj, tradicie, la reĝo premiis la venkintojn per elektitaj





taŭroj. Tial, kelkajn tagojn antaŭ la festo, reĝaj servistoj trairadis la montajn regionojn de la lando, serĉante pri la plej taŭgaj bestoj. Kiam tiuj servistoj atingis la bredejon de Arĥelao, ravite ekvidis la plej belan, impres grand-korpan, blank-makulitan nigran taŭron, kaj kompreneble ili deziris ĝin aĉeti, eĉ oferinte tre altan prezon. Arĥelao hezitis vendi tiun sian beston, ĉar, aparte bredita de Pariso, ĝi estis ties plej amata taŭro. Li hezitis, sed li ne povis rifuzi al la reĝaj senditoj la vendon, do, li, vole nevole, liveris al ili la beston. Kiam Pariso prenis la bedaŭran informon, ĉio estis jam farita, li do, vane afliktiĝis, koleris, indignis, li ne plu povis fari ion. Fine, malgraŭ la kontraŭiĝo kaj maltrankviliĝo de liaj kunuloj, precipe malgraŭ la petoj kaj protestoj de Ojnona, li decidis sekvi la reĝajn senditojn ĝis la granda urbo, celante trovi la taŭgan okazon reakiri sian amatan taŭron. Tiele, li konservis sian memregecon kiam li troviĝis en tute fremda, nekonata medio, en loko kie ĉio estis por li nova kaj stranga. Li estis ege impresita de multo, tamen li ne perdis sian kuraĝon kiam li prezentis sin antaŭ la respondeculoj por submeti al ili sian partopren-peton en la atletaj konkursoj, en kiuj la plej granda premio estis lia amata taŭro. La prezentiĝo de la nekonata, eksterordinare bela junulo en la tereno de la ludoj profunde impresis ne nur la ceterajn spektantojn, sed ankaŭ la nobelojn kaj la membrojn de la reĝa familio. Ĉies surprizo iĝis ankoraŭ pli granda, kiam la nekonata junulo komencis venki sinsekve ĉiujn siajn konkurantojn, multaj el kiuj estis bone ekzercitaj kaj trejnitaj junaj nobeloj.

Unu momenton, granda tumulto kaj plena konfuzo eksplodis, kiam en la stadionon eniris la reĝidino Kasandra (Κασάνδρα), kiu, ekvidinte Parison, ekkaptis hakilon kaj furioze, sovaĝe kriante, sin ĵetis kontraŭ lin, provante lin mort-bati. La lastan momenton oni povis ŝin deteni, tamen la reĝo postulis eksplikojn, li, do, ordonis, ke oni konduku la junulon kaj la reĝidinon antaŭ li. Kiel sciante, Kasandra estis neeraripova divenistino, tamen, pro malbeno de la dio Apolono (Απόλλων), ŝiaj antaŭdiroj, malgraŭ ĝustaj, estis

kredataj de neniu. La malfeliĉa junulino lamentante klopodis ĉiamaniere konvinki sian patron, ke je la vizaĝo de la nekonata junulo ŝi rekonis sian perditan fraton, la certan kaŭzonton de la totala katastrofo de Trojo. Kiel ordinare, la reĝo malatentis la aŭgurojn de Kasandra, tamen la ideo, ke la junulo povas esti lia filo, enigis lin en pezajn kaj maldolĉajn pensojn. Estis eble lia kulpa konscienco, estis eble la beleco de la junulo, ties neeksplikebla lerteco je okupoj decaj al nobeloj, pli probable estis haŭtmakuleto sur la dekstra brako de la junulo, tute egala al tiu, kiun la reĝo estis distinginta sur la brako de la forlasita bebo. La reĝo ordonis enketadon, oni venigis en la palacon la adoptan patron de Pariso, tiel, post nelonge ĉio estis klarigita kaj eksplicita, jes, Pariso estis filo de la reĝo, do, plenrajte li prenis sian lokon, ne nur en la palaco, sed precipe en la koro de la reĝo, kiu ekde tiam favoris kaj aparte amis tiun sian longe perditan filon.

Kaj kio pri Ojnona? Estas kompreneble, ke la junulino ne povus havi lokon en la palaco, ne nur ĉar la reĝa familio ne povus ŝin akcepti kiel bofilinon de la reĝo, sed ankaŭ ĉar ŝi ne povus elteni tion. Ŝi estis nimfo, al kutimiĝinta al tute libera, simpla travivo en la libera, belega naturo, apud la ordinaraj, facilanimaj homoj de la monto, ŝi ne povus resti en tegmentitaj lokoj, porti komplikajn, delikatajn robojn kaj ornamojn, paroli kaj konduti laŭregule. Nu, Pariso loĝis en la urbo, ĝuante per ĉiuj siaj sensoj la lukson de la palaca vivo, jes, li loĝis malproksime de Ojnona. Tiu lasta amis lin ne nur multe sed eksterordinare pasie, tiel, ke senproteste ŝi akceptis la novan situacion. Ŝi tute kredis al la forto de ŝia amo, do, ŝi konservis la esperon, ke Pariso post nelonge sentos, same kiel ŝi dolorige, la mankon de ilia feliĉa kunvivado; ŝi senlime konfidis lin, do, malgraŭ sia granda malfeliĉo, ŝi ĉion eltenis, ŝi klopodis montri, ke sufiĉas al ŝi la neoftaj liaj vizitoj, kiuj daŭris nur kelkajn tagojn.

Estas vere, ke en la komenco Pariso ne povis ne pensi pri sia amatino, pri ilia bela, senzorga kaj feliĉa vivado, li sopiris al ŝi, li sopiris al ĉio ŝia. Tio, en la komenco, ĉar la reĝa palaco estis plena je tentoj kaj allogaĵoj. Estis tiom da belegaj sklavinoj, da liberpensaj, fascinaj nobelinoj, da bonvolaj konkubinoj, estis riĉa diverseco de tiaj ĝuoj, tiel iom-post-iome la bildo de Ojnona, en la menso de Pariso iĝis pli kaj pli malklara, iom-post-iome ĝi preskaŭ estingiĝis.

Ojnona sciis ĉion; estis tiom da homoj, kiuj venis el la urbo kaj rakontadis multon pri la faktoj kaj famoj, rilate al la vivmaniero de la riĉuloj kaj nobeloj. Ŝi povis fari nenion, ŝi nur suferis, ŝi nur klopodis elteni kaj konservi ian preskaŭan, obtuzan esperon, ĝis la lasta momento.

Kaj tiu lasta momento venis, kiam atingis ŝin la





informo, ke Pariso preparis longan vojaĝon tra la mondo. Kelkajn tagojn antaŭ lia ekiro, Ojnona trovis la manieron renkontiĝi kun li, kaj tiun fojon, ŝi tute forgesis sian devenon, sian reputacion, sian fierecon, ŝi petegis lin, humilece ŝi veis, ploradis antaŭ li, ĉiaforte, sed vane ŝi klopodis ŝanĝi lian decidon. Pariso foriris kaj Ojnona sciis jam tre bone, ke ĉio estis por ŝi definitive perdita.

Pariso foriris, post longe li revenis kaj kun si li venigis fremdan virinon kaj kruelan militon! La antaŭdiroj de Kasandra veriĝis, tamen nun estis tre malfrue, nun ĉio estis preninta sian fatalan vojon!

La informoj pri la kruela milito, pri la senfinaj mortigoj de la plej bravaj trojaj herooj, pri ĉiuj malagrablaj okazintaĵoj atingis akurate la malproksiman mondon de Ojnona. Kune kun ĉio tio ĉi atingis ŝin informoj pri la fremda virino, pri ties nepriskribebla beleco, pri la pasia amo de Pariso al ŝi, pri ĉio rilata al ŝia propra, neeltenebla malfeliĉo! Ĉiu tia informo estis doloriga pikbato en la koro de la malfeliĉa Ojnona.

Pasis jaroj kaj la milito daŭris kaj daŭris, ĉiam same kruela, sovaĝa, virovora. Malgraŭ tio, Pariso daŭrigis ĝuadi la favoron de sia patro, la komforton de la reĝa vivo, precipe la neelĉerpeblan dolĉecon de la unika sia amorentino. Li ne estis tre lerta en la aferoj de la milito, ne tre ofte li partoprenis batalojn, li ne riskis multe sian vivon, ordinare li batalis de malproksime, ĉirkaŭita de bone armitaj, kuraĝaj kunuloj, li evitis enmiksiĝi en kolizioj kontraŭ la plej famaj helenaj batalantoj, tiel li estis sekura, dum la ceteraj, vere bravaj, distingindaj trojaj militistoj falis la unu post la alia. Li estis sekura, tamen nur ĝis kiam venis la kriza tago, venis la fatala momento, en kiu la plej lerta helena arkisto, Filokteto (Φιλοκτῆτης) streĉis sian teruran pafarkon, metis la pezan sagon, ekcelis atente kaj pafis!

La neordinara, dika sago trafis Parison ĉe la brusto, ĝi trapasis la kirason kaj Pariso falis! Multaj ŝildoj leviĝis, kovris lin protekte, dekoj da kunuloj ĉirkaŭis, levis lin, per la plej rapidaj ĉevaloj ili transportis lin malantaŭ la murego, en la sekurecon de

la reĝa palaco.

La vundo estis tre serioza, ĉiuj plej bonaj kuracistoj de la lando kolektiĝis ĉirkaŭ la vundito, ili faris ĉion eblan, tamen la kazo estis kriza. Pariso suferis multe, la doloro estis ofte neeltenebla, li perdis kaj retrovis mult-foje la konscion, la kuracistoj ne plu povis fari ion, ili retiriĝis, venis la vico de la pastroj, de la preĝoj, de la sanktoferoj.

Tamen, en momento de mallonga pens-klareco, la vundito alvokis sian plej fidelan serviston, li ion povis murmureti al li kaj tuje, la plej bonaj reĝaj ĉevaloj estis selitaj, kaj fideluloj de Pariso fulme kuris sur la monton. Ili atingis la loĝejon de Ojnona kaj plorante transdonis al ŝi la peton de Pariso, ke ŝi iru apud li, kun ŝiaj kuracherboj. Ojnona, kvazaŭ fulmobatita, restis iom senmova, rigidmiena, silenta. En ŝi eksplodis forta batalo inter diversaj, kontraŭaj inter si sentoj, ŝia koro estis preta krevi, kaj tiam, la servisto de Pariso, senpacience ekkriis: "Ojnona, Pariso petas vian helpon, savu lin!". La larmoj abunde elfluis el la belaj okuloj de Ojnona, sed per voĉo tremanta ŝi respondis: "Li petu la helpon de Helena!", kaj ŝi fermis la pordon!

Mult-foje mi pensis, ke la kolero de perfidita virino estas forto neretenebla, ĝi estas armilo mortiga; mi pensas pri tio, sed mi ankaŭ meditas pri la vira perfido kontraŭ la sentoj, kontraŭ la virina sindediĉo, kontraŭ la virina varma amo, kaj mi trovas tiun perfidon abomene severa!

Pri tiu afero oni povas longe paroli, oni povas multon skribi, tamen, mia rakontado ne finiĝis, mi devas aldoni ankoraŭ, ke post kelkaj horoj, Ojnona rekonsciĝis, ŝi metis en sia sako siajn kuracherbojn kaj ekiris, irante al la urbo. Kiam ŝi atingis la palacon, ŝi informiĝis, ke antaŭ kelkaj minutoj Pariso estis mortinta. Ŝi ne haltis, ŝi iris returne al sia monto. Tie ŝi lasis sin al senfina plorado. Kiam ŝi ne plu havis larmojn, iris ĉe fora, sole staranta arbo, de kiu ŝi sin pendumis!

Ŝi mortis kelkajn horojn post Pariso kaj la homoj diradis, ke oni enterigis la malfeliĉajn geamantojn kune, en komuna tombo, sur la monto.


Mi ne povas esti certa pri tio, tamen mi pensas, ke tia fino iom mildigas la maldolĉan guston, kiun lasas al mi tiu ĉi tragika historio!

verkis **Spiros Sarafian** el Grekujo  
(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)



## Mi pripensis...

**E**n septembro mi pasigis unu semajnon en Kuşadasi, marborda urbo en Turkio. Krom la longa, laciga vojaĝo per buso kaj kelkhoraj atendadoj ĉe landlimoj, mi fartis bone en tiu urbo. La hotelĉambro estis bela kaj pura, la juna deĵorantino en la RÉCEPTION estis tre simpata, afabla junulino. Bedaŭrinde, nia komunikado realiĝis nur per gestoj kaj ridetoj, ĉar mi ne parolas angle. Kiam temis pri enskribiĝo al ekskurso, helpe interpretis rumanaj turistoj, kiuj loĝis en la sama hotelo kun mi. Ili estis pli junaj ol mi, en la lernejo ili estis lernintaj la anglan lingvon, mi ne. La vendistoj en bazaroj, vendejoj, ĉiuj angle alparolis la fremdulojn. Mi nur levis la ŝultrojn kaj ili vidis stultan, malkleran maljunulinon, kiu eĉ angle ne parolas.



Mi pripensadis: Ĉu ne estintus pli bone eklerni la anglan anstataŭ Esperanto? Sed en la vilaĝo, en kiu mi estis instruistino, en 1982 ne estis angle parolanta instruistino, nek kurso pri la angla. Mia gepatra lingvo estas la hungara, unue mi devis ellerni la ŝtatan lingvon, la rumanan, kaj „ne bezonis” alian lingvon en la ĉiutaga vivo. Tiutempe ne estis ebla aŭ estis tre malfacile akiri pasporton por fremdaj landoj. Estis tempo, kiam oni devis „raporti” la enhavon de la konversacio kun fremdlandano, sed tio okazis preskaŭ neniam.

Kiam mi estis leginta artikolon pri Esperanto en semajna gazeto, mi ekinteresiĝis pri tiu lingvo. Mi akiris lernolibron el Hungario kaj eklernis. Ĝi havis grandan avantaĝon kontraŭ la angla: kaj la ortografio, kaj la prononcado estis facilaj, ne parolante pri la simpla gramatiko. Ĝi estis ellernebla ankaŭ por mi, loĝanto de sikula-hungara vilaĝo en Rumanio.

Nu, la mondo ŝanĝiĝis, mi maljuniĝis kaj nuntempe la angla lingvo estas instruata en lernejoj. (Oni eĉ ne volas lerni alian lingvon krom la angla.)

Mi revenu al la dilemo: Ĉu ellerni la anglan anstataŭ Esperanto?

Mi pripensis la demandon. Jes, la angla estas bezonata kaj utila por la nuntempuloj, estus bone, se ankaŭ mi parolus ĝin. Ne en mia hejmlando, en la

## verkis kaj sendis Lenke Szász, el Rumanio

hejma vilaĝo nur se mi vojaĝas eksterlanden. En fremdaj landoj mi povus paroli en réception de la hoteloj, en vendejoj ktp. Tiu scio estus utila.

Sed ĉu la utileco nur ĝojigas la vivon?

Esperanto ĝojigas mian vivon de pli ol tri jardekoj. Pere de ĝi mi akiris geamikojn el Japanio ĝis Brazilo. Pere de ĝi mi havis verajn geamikojn en Pollando, Francio, Anglio, sen paroli pole, france aŭ angle. Pere de ĝi mi ekkonis la poetinon Marjorie Boulton kaj mi fieras pri ŝia ĝismorta amikeco.

Esperanto donis al mi multe pli ol baza scio (utila) de la angla, kiun regas multaj pli junaj homoj ol mi. Esperanto estas mia lingvo apud la gepatra hungara. Kaj tiel sentas ankaŭ miaj geamikoj esperantistaj dise de la mondo.

Jes, la angla estas utila kaj eĉ necesa por la pli junaj homoj. Oni ellernu ĝin. Sed ne anstataŭ Esperanto – apud Esperanto! Por tiu, kiu kapablis ellerni la anglan, Esperanto estas kvazaŭ ludo, facile lernebla. Amikoj akiritaj el la tuta mondo riĉigas niajn vivojn, meritas do la penon.

Estus bonege, se Esperanto estus instruata en ĉiuj lernejoj, en ĉiuj landoj almenaŭ baznivele. Tiuj, kiuj dezirus pli altan nivelon, facile povus akiri la sciojn ankaŭ per memlernado.

Esperanto iusence estas pli ol la angla.

verkis kaj sendis **Lenke Szász** el Rumanio

## Peto de simieto

Bona mi estas,  
inteligenta  
kaj talenta.  
Iam mensogema,  
eĉ ŝtelema -  
al vi mi similas.  
Nun mi vin petas:  
-Donu dolĉajeton  
al mi, la Simieton!...



verkis kaj sendis  
**Elena Popova** el Bulgario  
la bildon desegnis  
**Hori Jasuo** el Japanio



**L**a magazino "La Ondo de Esperanto" aperadis ĉiumonate ekde 1991. Nun venas tempo adiaŭi unu el la vere malmultaj profesiaj periodaĵoj en la Esperanto-movado. "Sen La Ondo ne nur la rusia Esperanto-movado, sed ankaŭ (aŭ eble eĉ unuavice) la internacia iĝos malpli riĉa", opinias ĵurnalisto Grigorij Arosev.



La redakcio de La Ondo de Esperanto anoncis pri la baldaŭa ĉeso de la magazino. Post la relative mallonga periodo de nur-elektronika ekzisto La Ondo, senĉese aperanta ekde 1991, entute malaperos. En la editorialo, subskribita de la eldonanto Halina Gorecka kaj redaktoro Aleksander Korĵenkov, kiel ĉefa kaŭzo de la ĉeso estis menciita problemo kun la malboniĝanta vidkapablo de Korĵenkov. Ni ne havas kialojn malkredi tion.

La titolo La Ondo de Esperanto ne estis elpensita de Gorecka kaj Korĵenkov. Magazino kun tiu titolo aperadis en Moskvo inter 1909 kaj 1917, tiam ĝin eldonis la financa oficisto Aleksandr Saĥarov. La aperon de La Ondo benis mem Zamenhof. En la samaj jaroj aperadis ankaŭ la movada ĵurnalo Ruslanda Esperantisto (fakte la sama titolo estis uzita eĉ dufoje: inter 1905 kaj 1908, kaj tre mallonge en 1909). Kurioze ke ambaŭ titolojn transprenis Korĵenkov kaj Gorecka en la jaro 1991, re- kaj ekeldoninte La Ondon kaj Ruslandan Esperantiston.

**La eldonado startis** en la malfrua printempo de 1991, kaj tio sufiĉe gravas por kompreni la procedon, kiun ekgvidis la geedzoj. Post nur kelkaj monatoj Sovetunio disfalis, kaj la sekvoj estis ne nur politikaj, sed ankaŭ ekonomiaj: oni povas nur imagi, kiom da fortoj kaj kompreneble mono kostis por Korĵenkov-Gorecka daŭra eldonado de la periodaĵoj en la epoko de hiperinflacio. En la unuaj jaroj Ruslanda Esperantisto estis nur primovada eldonaĵo, La Ondo estis nomata "soci-kultura" magazino.

Tiel do estis, sed en iu momento iĝis klare, ke

estas malfacile redakti kaj eldoni du periodaĵojn. Rezulte Ruslanda Esperantisto ĉesis kaj migris en La Ondon, kiu por pluraj jaroj fariĝis grava rusia eldonaĵo. Antaŭ kelkaj jaroj Korĵenkov kaj Gorecka anoncis ĉesigon de la papera



Aleksander Korĵenkov

versio, argumentante tion per la daŭra plimalfaciliĝo de la produkta kaj ekspeda procedoj kaj samtempe atentiginte, ke la papera versio estus pli profita por ili. Kaj nun, post 28 jaroj, la ondo reiras malantaŭen.

Ĝi nek estis nek estas la sola Esperanto-periodaĵo en Rusio, kaj ĝi ne estis ideala. La Ondo eĉ ne estis objektiva, ja ĉiam prezentanta la mondovidon de ties redakcio – tamen ĉu povus esti alie? Sed sendube ĝi estis kaj estas profesia eldonaĵo, kiu ĉiam kreis solidan bildon pri la Esperanto-movado en Rusio, en lando kiu pro la historiaj cirkonstancoj ĉiam havas apartan (ne legu "plej gravan", legu laŭvorte "apartan") rolon en la historio de la Esperanto-movado. La ceteraj periodaĵoj en la sama lando vole-nevole ĉiam havis antaŭ la okuloj ĝuste La Ondon, kaj kreis konceptojn de siaj eldonaĵoj surbaze de la impresoj pri La Ondo – kio estis en ĝi bona, kio estis malbona.

**Mi mem ekaŭdis** pri Ruslanda Esperantisto kaj La Ondo meze de la 1990-aj jaroj, kiam mi profundiĝis en la movadon kaj ekaktivis tie. Tiam mi estis tre juna kaj opiniis ambaŭ eldonaĵojn tre enuigaj. Poste mi ekkonis riproĉojn je la adreso de ties eldonantoj. Poste ni kunlaboris. Poste ni konfliktis. Poste ni denove kunlaboris. Poste ni parte amikis kaj tio daŭras – nu, almenaŭ mi tiel esperas.

Sed intertempe la geredaktoroj daŭre ĉiumonate preparis novan numeron de La Ondo sur same profesia nivelo.

Mi (kaj ne nur mi) malŝategas la obstine uzatan en La Ondo vorton "Ruslando" kiel nomon por la lando, kie mi naskiĝis kaj vivis ĝis certa aĝo. Mi ne ŝatis, ke Korĵenkov kaj Gorecka ne atentis la fortegan junularan Esperanto-movadon en Rusio el la 1990-aj. Mi krome ne ŝatis tion kaj jenon, sed tio estas ja ilia privata vidpunkto, je kiu ili rajtis, kaj tio havas neniun rilaton al la kolosa laboro, kiun faris kaj ĝis nun faras la geeldonantoj.

**Multo ŝanĝiĝis intertempe**, Korĵenkov kaj



Halina Gorecka

Gorecka spertis translokiĝon el la urala Jekaterinburg en la baltmaran Kaliningradon, postvivis gravan malsanon de Halina Gorecka (kun feliĉa fino) kaj sendube multon alian, kion la ekstera publiko ne scias.

Sed... intertempe la geredaktoroj daŭre ĉiumonate preparis novan numeron de La Ondo sur same profesia nivelo.

Nur tiu, kiu mem redaktas aŭ eldonas ion povas vere kompreni la amplekson de tia laboro. Mi estas ĝuste tiu, kiu laŭ propra sperto tion komprenas. Kaj admiras.

Sen La Ondo ne nur la rusia Esperanto-movado,

sed ankaŭ (aŭ eble eĉ unuavice) la internacia iĝos malpli riĉa. Periodaĵoj regule malaperas, ĉiam pro malsamaj kialoj, sed ĉiam kun la sama sekvo: anstataŭ ili venas nenio. Ni deziru al Korĝenkov kaj Gorecka fortan sanon por realigado de aliaj planoj – je la fino de artikolo tio sonas iom banale, sed des pli vere.

**Grigorij Arosev**

Fonto: **Libera Folio** : <https://www.liberafolio.org/2019/10/02/la-ondo-de-esperanto-foriras/>

## Mesaĝo de UEA okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj - 24 oktobro 2019

## Gazetaraj Komunikoj de UEA N-ro 831 / 2019-10-24

*[Kun afabla peto republikigi ĝin en viaj lokaj kaj landaj paperaj gazetoj kaj aperigi ĝin en viaj aliaj komunikiloj. Dankon!]*

**O**kaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj 2019, la mondo frontas defiojn daŭre kreskantajn – ekde la klimata krizo ĝis la daŭra kaj eĉ intensiĝanta malpaco en multaj mondopartoj. Kaj Unuiĝintaj Nacioj mem estas minacata de financa krizo kaŭzita de la rezisto de multaj membraj ŝtatoj al ĝustatempa kaj plena pagado de siaj porcioj de la kostoj.

Se iam estis tempo kiam la popoloj de la tuta mondo alpaŝu Unuiĝintajn Naciojn por esprimi sian apogon, tiu tempo estas hodiaŭ.

Jam de la komenco de Unuiĝintaj Nacioj, nia Asocio, la Universala Esperanto-Asocio, ĉiam subtenis ĝiajn celojn kaj idealojn. Jam de la jaro 1954, do de 65 jaroj, nia Asocio ĝuas konsultajn rilatojn kun UNESKO; kaj jam de la jaro 1950 ni komencis dialogon kun Unuiĝintaj Nacioj kiu poste kondukis al formalaj rilatoj kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio. Ni senlace laboras inter niaj membroj kaj la membroj senlace laboras inter la publiko en pli ol cent landoj, por disvastigi informojn pri UN kaj trovi kampojn kie ni povas kune labori. La klopodo vivteni kaj funkciigi la sistemon de UN havas la saman idean bazon kiel nia klopodo disvastigi Esperanton, nome krei harmonian, pacan kaj egalecan rilaton inter ĉiuj homoj, de ĉiuj sociaj fonoj, cele al vera kaj kompleta interkompreniĝo.

Ni promesas, ke ni restos plene dediĉitaj al Unuiĝintaj Nacioj kaj daŭros aktive laboradi por

konsciigi homojn pri la graveco de toleremo, diverseco kaj solidaro kiel vojoj por teni pacon kaj por kontribui al vere libera kaj emancipita socio, kie regu amikeco kaj respekto inter ĉiuj homoj kaj popoloj.



Ni taksas esenca la rilatadon de UN kun instancoj de la civila socio, ĉar grupoj de la civila socio kapablas rekte rilati kun homoj kaj tiel efektive disvastigi la valorojn de UN. Ni konscias, ke UN ne kapablas atingi siajn altajn celojn nek plenumi siajn specifajn programojn sen la aktiva kunlaboro de ni ĉiuj en spirito de egaleco kaj reciproka respekto.

En la jaro 2020, nia Universala Kongreso de Esperanto (Montrealo, Kanado, 1-8 aŭgusto) estos aparte dediĉita al festado de la 75-jara jubileo de Unuiĝintaj Nacioj. Ni alvokas al nia membraro kaj al ĉiuj Esperanto-asocioj kunlabori por ankoraŭ pli vaste informadi pri UN kaj ĝia graveco por la monda paco, kaj aliĝi al ĝiaj programoj kaj iniciatoj kiam kaj kie eble, ekzemple pere de naciaj UN-Asocioj. Ni petas, ke ili venu amase al Montrealo por kunfesti la atingojn de UN kaj ke jam nun ili disvastigu tiun ĉi mesaĝon en la propraj medioj kaj inter la publiko.

Fonto: <https://uea.org/aktuale/komunikoj/2019/Mesagxo-de-Universala-Esperanto-Asocio-okaze-de-la-Tago-de-Unuigxintaj-Nacioj-24-oktobro-2019>



**LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)**  
(daŭrigata)

Senvorte ŝi foriris. Krome, ŝi ŝajnis ne aŭdi ilin. Ŝi restadis tutajn horojn senmova kun siaj krucitaj manoj sur la genuoj, silente kaj fikse rigardante la lokon.

Ŝi estis dorskurba, preskaŭ duonklinita, blanka, kvazaŭ mortinta, kun blujaj vejnoj ŝvelintaj en la angulo de la palpebroj.

Ofte, kiam oni vokis ŝin, ŝi ne respondis sed kontentiĝis plue kunpremi sian etan kavan buŝon.

Tamen ŝi ne estis surda.

Ĉiufoje kiam iu landnomo eliris el unu el ili, ŝi ekstremis, subite diris per sia malforta kaj trankvila voĉo:

"Jes... mi memoras pri la tago de Pasko, kiam brulis la preĝejturo de Temnaja..."

aŭ

"La pavilono... jam, kiam vi foriris, la vento estis rompinta la vitrojn... mi demandas min, kio tio fariĝis..."

Ŝi denove silentis kaj rigardis tra la fenestro la blankajn murojn kaj la ĉielon super la tegmentoj.

"Kiam do finfine alvenos la vintro?" ŝi diris. "Ha Dio mia! Kiel longe ni jam vidis nek la malvarmon nek la glacieron!... La aŭtuno tre longe daŭras ĉi tie... Certe en Karinovka ĉio estas blanka, kaj la rivero frostiĝis... Ĉu vi memoras, Nikolao Aleksandroviĉ, kiam vi estis tri-kvar jaraĝa?... mi mem estis ankoraŭ juna... via nun forpasinta patrino diris: "Tatjana Ivanovna, oni ja rimarkas, ke vi estas nordodevena, filino mia!... Je la unua neĝo vi freneziĝas..." ... ĉu vi memoras?"

"Ne" murmuris Nikolao Aleksandroviĉ kun laca mieno. "Sed mi mem bone memoras, kaj baldaŭ" ŝi grumblis, "mi restos la nura homo, kiu memoros..."

La Karinoj ne respondis. Al ĉiu el ili sufiĉis la propraj memoroj, antaŭtimoj kaj tristecoj.

Iun tagon Nikolao Aleksandroviĉ diris:

"La ĉi-tieaj vintroj ne similas la niajn"

Ŝi ekstremetis.

"Kiel do, Nikolao Aleksandroviĉ?"

"Vi ja sufiĉe baldaŭ mem vidos" li murmuris.

Ŝi rigardis lin fikse kaj silentis. La stranga malfidema kaj konfuza esprimo en ŝiaj okuloj mirigis lin je la unua fojo. "Kio okazas al vi, oldulino mia?" li dolĉe demandis.



Nenion ŝi respondis. Al kio utilis?

Ĉiutage ŝi rigardis la kalendaron, kiu markas la komencon de oktobro. Ŝi longe pririgardis la randojn de la tegmentoj. Sed ankoraŭ ne falis la neĝo. Ŝi vidis nur malhelajn tegolojn, pluvon kaj tremetantajn velkintajn aŭtunajn foliojn.

Ŝi estis tiam sola la tutan tagon.

Nikolao Aleksandroviĉ priserĉis la urbon, provante eltrovi raraĵojn, juvelojn por la komercejo.

Ili sukcesis vendi kelkajn malnovaĵojn kaj aĉeti aliajn.

Antaŭe Nikolao Aleksandroviĉ posedis kolektojn da altvaloraj porcelanaĵoj kaj ĉizelitaj pladoj.

Nun, kiam ĉirkaŭ la vespero li reiris hejmen, kun pakaĵo sub la brako, laŭ la avenuo Champs-Élysées, foje okazis al li forgesi, ke nek por sia domo nek por si mem li laboris.

Spirante la odoron de Parizo, rigardante la brilantajn lumojn en la krepusko, li rapidis, preskaŭ feliĉa, kaj kun la koro plena de trista paco.

Lulu sukcesis sin dungigi kiel manekeno en kudrarta firmao.

Iom post iom, la vivo organiziĝis.

Ili malfrue reiris hejmen lacaj, kunportante el la strato, el la laborejo, specon de eksciteco, kiu ankoraŭ daŭris kelkan tempon antaŭ ol ĝi elĉerpiĝis per ridoj kaj paroloj.

Sed la malluma domo kaj la muta maljuna virino iom post iom kvazaŭ frostigis ilin.

Ili rapidege vespermanĝis, enlitiĝis kaj senŝone dormis, batlacigitaj de la malfacila labortago.

**Fino de la 7a Ĉapitro**

(daŭrigota)

tradukis MIKELO (Michel Dereyger), el Francio

**“Proponi Trankvilan Morton”  
Kiel ni renkontas nian lastan momenton?**

de Dr. Isitobi Kozoŭ

(Kobe ĵurnalo 2019/06/10 08/26:  
vespera ĵurnalo, ĉiu sabato)

**Dr.** Isitobi Kozoŭ naskiĝis en la jaro 1935 en gubernio Hiroŝima, Japanio. En la jaro 2005, li konvertis de la Tokjo Saiseikai Centra Hospitalo kiel kirurga doktoro al la speciala maljuna protektaĵo “Aŝihana Kadukulejo” (Setagaja, Tokjo) kiel regula doktoro. En la jaro 2005, li proponis la trankvilan morton. Poste, li kontinue ekspedas la meriton per diversaj rimedoj de la kadukulejo.

Mi deziras proponi trankvilan morton kiel la ideala rimedo por la fino de la vivo.

### 1 La signifo de vivlongiga kuraco estas demandita

Medicino progresas, sed ne povas vivi homon kontinue. Alifranke estas diskuto, ke simple longigi vivon estas bone aŭ ne. Kiel ni devas respondi al la kadukecan maljunulon kies fino estas antaŭsupozebla. En Japanio, nun estas demandita pri la signifo de la vivlongiga kuraco. Antaŭ ĉirkaŭ 20 jaroj, en la maljuna protektaĵo de Hokkajdo, 80 jara maljunulo melenis. Li rifuzis iri al hospitalo kaj mortis post ĉirkaŭ unu semajno. Tiam NHK eduka televido elsendis la fakon. Kelkaj doktoroj komentis, “Ĝi estas forlaso de kuracado, ĉu ne?” Plie disvastiĝis la diskuto pri la afero eĉ en la parlamento. Sed lasta tempe, ŝajnas multigi la okazo, en kiu la vivlongiga kuraco estas rifuzita de koncernato aŭ la familiano en urĝa hospitalo. Antaŭ ĉirkaŭ 3 jaroj simbola akcidento okazis. La vira maljunulo suferinte misglutdevenan pneŭmonion estis portita en la hospitalon en Tokio. La filo alkuris kaj diris al la respondeculo, ke lia patro skribis la antaŭan indikan artikolon. La ekipita artefarita spirado estis deprenita, kaj la paciento baldaŭ mortis je 84 jaroj. La tuta fakto estas elsendis en NHK ĝenerala televido, sed nenio tumultis kiel la antaŭa okazo.

Iu persono diras, “Ĉu homo povas decidi la mortan periodon? Ĝi estas decidita de nur Dio, kaj homo devas sole klopodi kontraŭ morto.” Tamen en la logiko estas diskutata punkto. Kvankam oni ne povas

interveni en alia vivo, ĉu ne estas interveno fari vivlongigan kuracon dirante “Animfirmiĝu! Animfirmiĝu!” al la persono en la lasta stadio? Krom se la kuraco estus favoro por la paciento.... En la grandaĝula socio, ni devas mem konsideri la signifon de la terminala kuracado. Kiel ni povas renkonti bone nian lastan stadion laŭ ni mem? Mi skribos mian spertaĵon poste.



### 2 Post ĉio ni ne povas kuraci kadukecon, kaj turmentiĝas pri la kontraŭdiro de kuracado.

Kiel kirurga doktoro en hospitalo dum 40 jaroj, mi bataladis kune kun pacientoj celinte konkeri malsanon. Batalante kun kancero kaj cerba infarkto, mi kontinue kuracis enkondukante nutron pere de guto aŭ tra nazotruo kiam la paciento ne povas manĝi per buŝo pro kadukiĝo. Plie mi agitadis pacientojn dirante “Animfirmiĝu! Animfirmiĝu!” Tiam mi pensis, ke tio estis kuraĝigo kaj natura aranĝo. Antaŭ dudek kaj kelkaj jaroj mi havis la aĝon de 60 jaroj. Tiam mi sentis malfortaĝon de mia korpo. Multaj kancero kaj arteriosklerozo estas ankaŭ la atestaĵo de kadukiĝo. Ĉiu homa vivo havas limon. Kiom da grado doktoro devas kuraci malsanon? Al iaj pacientoj ni trudas kuracadon, suferigas ilin, kaj rezulte ni ne povas kuraci. Ĉu ĝi estas kontraŭdira punkto en la kuracado. Mi komencis konsideri tiel. Kiel paciento fartas post ricevi kuracadon? Dezirante vidi en maljuna protektaĵo la maljunulajn pacientojn kiu ricevis nian terapion, mi eklaboris kiel regula doktoro en la kadukulejo. Tie mi vidis ekstersupozan scenon. La paciento en alta grado de flegado estis enkondukita nutron tra nazotruo aŭ gastrostomio, kaj kuŝiĝadis regardante kave aeron. Ĝi ŝajnis trudi vivlongigan kuracon. Kaj flegisto klopodas kun sia tuta forto manĝigi al paciento rezulte la misglutdevena pneŭmonio. La paciento, kiu ricevis kuracon en urĝa okazo, revenas al kadukulejo kun gastrostomio. Tio estas malbona cirkulo. La prizorgada mondo estis nematura en la ideo. Ni bone sciis la limon de homa vivo, tamen ni ne serioze konsideris kiel ni devas kuraci la maljunulon. Morto atendas maljunulojn post kadukeco, sed kiam ni alfrontas iun lastan periodon, ni alvokas ambulancan kaj la paciento komencas ricevi vivlongigan kuracon.

(daŭrigota)

tradukis kaj sendis Kacu Matoba el Japanio

**L**a pordo brue malfermiĝis kaj la aerfluo ekluligis la kurtenon. La fenestro kaj la pordo al la verando estis malfermitaj. La varmega julia tago ekstere konsumis kaj la lastan humidon el la tero. La ardega aero embarasis la spiradon de homoj kaj animaloj.

- Kiam vi finos? – vira tenoro rompis la sonaton de Šopen.

Ne sekvis respondo. La piano daŭris ludi la sorĉan melodion de la grandega komponisto.

Ah, kiel ŝi ŝatis ludi tiun ĉi sonaton! Ĝi varmigis ŝian koron, donis al ŝi fortojn iri antaŭen. Pro kio li ŝin rompis?

- Ljudmil estas sola en la ĝardeno, sed vi tie ĉi muzikas – kolere diris la viro.

Ja pro tio ŝi malfermis la pordon de la verando. La knabeto aŭskultu la varmajn tonojn de la piano, kiuj enportu harmonion en lia infana animo. Por ke li ŝatu la belecon per la muziko.

- Bone, mi finas!

- Mi ne revenos por tagmanĝo. Mi laboros ĝis malfrue. Ne atendu min!

- Kiel ordinare – silente diris la vortojn la pianistino.

- Kion vi aludas?

- Ho, nenion speciale - oni aŭdis ŝian voĉon de la verando.

- Panjo, panjo vidu, kian kastelon mi faris!

- Jes, infano mia. Sabla!

Ĉu ŝia vivo ne okazis sabla?

Estis antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj. Ili renkontiĝis dum iu koncerto. Li donacis al ŝi florojn. Poste dum ĉiu ŝia koncerto li sidis je la unua vico, maldekstre, kun bukedo de sep ruĝaj rozoj. Tiel dum tuta jaro, ĝis kiam iun tagon li konfesis al ŝi sian amon. Li enamiĝis per la unua rigardo. Ŝi atendis tion, eĉ ĝin deziris. Li estis tiel galanta, atentema, ŝatis la muzikon. Ankaŭ kaj estis bela viro, post kiu multe da virinoj sopirĝemis. Laŭ liaj vortoj li havis eblecon krei familion. Li ne malŝparis monon, kiun, kiel mem diris, gajnis per honesta laboro. Post nelonga tempo li proponis al ŝi geedziĝon. Ŝi ĝoje akceptis. Ŝi ekamis lin kaj lia propono promesis sekurecon, ne vivon de ankoraŭ nekonata koncerta muzikistino. Malfacile nun oni eblos sukcesi en la muzikbazaru. Li promesis estu ŝultro de ŝi por ŝia estonta evoluo, sekuriganta ŝin finance. Ŝiaj koleginoj, malgraŭ ke malmulte enviis ŝin, subtenis la decidon, kiun ŝi devis preni.

Dum la unuaj jaroj ŝi flugis en la nuboj. Ŝi ne zorgis pri la pano, eĉ permesis sin lukson – tualetojn, vojaĝojn. Sed la koncertoj malmultiĝis kaj en la aliaj landoj oni entute forgesis ŝin. Li kondukis ŝin al la

laboraj renkontoj. Komence oni proponis al ŝi muziki ion.

- Ion pli konatan kaj kompreneblan, ĉar vi scias, tiuj estas negocistoj – avertis ŝin la organizantoj.

Kaj ŝi ja sentis, ke ili ne aŭskultas ŝin tiel, kiel la folkkantistinaĉojn, kiujn iuj el la negocistoj gvidis kun si kiel “ engaĝitaj kantistinoj”, sed fakte ili estis iliaj konkubinoj.

Ŝia edzo komence laŭdis sin, ke ŝi estas sciata pianistino, multe serĉata en eksterlando, sed fakte jam neniu rememoris pri ŝi. Ŝi estis kiel broĉo sur la kravato, por ke li elstaru antaŭ la aliaj kolegoj, ke ŝia edzino estas parto de la intelektuloj. Sed li baldaŭ komprenis, ke la kantistinaĉoj estas pli dezirataj ol la profesia pianistino. Kaj li ĉesis preni ŝin. Ŝi ne reagis, ĉar inter ili ŝi sentis sin nenecesa, ne je sia loko. Ŝi ne kontaktis multe kun la junulinoj de folko. Sed iufoje ŝi ekparolis Nina'n.

- Mi ne havis alian alternativon – sincere konfesis Nina. – Mi finis muzikalan lernejon, fako “Piano kaj perfektiga kantado”, sed oni ne akceptis min en la Akademio. Mi provis du foje, sed necesis protekto. Mi rezignis. Sed mi devis nutri min. Mi provis en la konkursoj, sed kaj tie mi ne havis sukceson. Aŭskultis min la produktcentro kaj proponis al mi ŝanĝi mian rolspecon – folko. Mi komencis. Mi pensis labori nur kelke da jaroj, ĝis kiam ordigi mian staton, sed okazis por ĉiam. Oni ne povas eliri el tio ĉi. Kaj kien mi iru? Oni gluis al mi la etiketon “folkkantistinaĉino” – ekploris Nina kaj svingis la manon. Ŝi havis belegan profundan voĉon, figuron kaj konduton de opera kantistino.

Tiun nokton ŝi longtempe ne povis ekdormi. Ŝi pensis pri Nina, sed kaj pri si mem: “Pro kio mi fiaskigis tiel facile mian karieron? Ĉu mi ne havis alian elekton? Kio min timigis?”

Ŝia edzo komencis ofte nokte malfruiĝi.. Kiam revenis li ne eniris la geedziĝĉambron, sed dormis en la kabineto. Fojfoje li eĉ ne revenis.

- Iĝis necese, ke mi restu labori ĝis malfrue kaj por ke ne maltrankviligu vin, mi tranoktis en la laborĉambro - mensogoj, kiujn ŝi jam sciis.

Iun tagon ŝi komprenis, ke estas graveda. Komence ŝi ekĝojis. La infano povus denove revenigi ilin unu al la alia. Sed ŝi ektimis – ĉu estas preta iĝi patrino? Kia patro estos li? Eble la naskiĝo lin ŝanĝos? Demandoj, demandoj... Ŝi ne kuraĝis diri al li.

Li ekĝojis, kiam komprenis, ke estos knabo.

- Mi havos heredanton, kiu prenos mian laboron.







Ŝi revis, ke li iĝu muzikisto.

- Mi lernigos lin ludi pianon.

- Ho, ne! Ĝis tie ĉi kun la piano! Lasu tiujn fantaziojn! Publika, aplaŭdoj, floroj kaj rozoj – efemeraj aĵoj... La vivo volas fortan manon, elastecon kaj scipovon gajni. “Muzikanto domon ne nutras”, vi scias tiun popoldiron, ĉu ne? Kaj vi mem komprenis tion, ke se ne estus mi, tiel vi vivus mizere per via muziko. De viro oni bezonas nutri familion. Mia negoco estas bona kaj li daŭrigos ĝin estonte.

Ili nomis lin Ljudmil, al la nomo de ŝia edzo. Oni diras, ke hodiaŭ estas moderne nomi la unuenaskitan filon al sia patro. Ŝi ne rezistis. Al ŝi plaĉis tiu nomo.

Verŝajne ĉar li, ŝia edzo, estis ŝia unua amo. Sed ĉu estis amo? Jes, kaj ŝi ankoraŭ amas lin.

Ĉu kaj li? Li revenis al la familio.

La malgranda Ljudmil rapide progresis en la pianludo. Ŝi estis certa, ke li havas disvolvitan aŭdokapablon kaj talenton. Ŝi donis al li lecionojn preskaŭ kaŝe, por ke ne kolerigu sian edzon, kiu daŭris insisiti, ke la filo akiru pli kaj pli kvalitojn por estonta entreprenisto. Li komencis lin gvidi al laboraj renkontoj, konatigi lin kun sia laboro, lin, ankoraŭ infano. Kaj Ljudmil? Al li estis interese, sed kiam sidis antaŭ la klavoj, li iel transformiĝis, lia vizaĝo eklumiĝis, ekbrilis. Ne estis necese instigi lin sidi antaŭ la piano. Ŝi ofte laŭdis lin muziki sola. Ŝi staris kaj tenere aŭskultis lian plenumon, emocian kaj profesian.

- Li iĝos bona muzikisto. Pli bona ol mi – ĝojis ŝi kaj feliĉa rideto radiigis ŝian vizaĝon. Sed ili kune atente gardis sian sekreton, por ke lia patro ne eksci pri la piano. Ŝi multfoje pensis, ke se li aŭdis lin, kiel la filo ludas, li ŝin pardonos kaj lasos Ljudi'n, kiel ŝi nomis sian filon, por ke li mem elektu sian vojon. Sed la patro estis malcedema, ke lia filo iun tagon daŭrigos lian negocon. Li registris lin studi inĝenieran profesion.

Kaj tiam okazis la neatendito.

Oni trovis al ŝi kanceron. La diagnozo estis terura. Oni diris, ke ŝi malmulte malfruiĝis. Sed ili kredas, ke

helpos al ŝi kaj ke tio ankaŭ dependas de ŝi. Ŝi bezonas ankaŭ la subtenon de la proksimuloj.

Komence ili kaŝis tion de Ljudi, sed li rapide eksciis. Li estis malesperigita, havis embarasojn en la Universitato, ne parolis, nur muzikis longatempe - List, Chopin, Mozart, Bach – profesie, sed iel triste sonis sub liaj longaj, teneraj fingroj... Lia patro aŭskultis en la gastĉambro. Li nenion diris, eĉ ne demandis kiam lia filo eklernis muziki majstre kaj kiu lin instruis. Li konjektis, ne reagis, ne riproĉis, sed ankaŭ kaj ne laŭdis lin. Kaj li enfermiĝis. Li jam ne malfruiĝis, estis atentema, preta al ĉio por faciligi la suferon de sia edzino. La malklara perspektivo lin turmentis. La virino, la patrino de lia filo, kiun li ĉiam amis kaj nun komprenis, ke ĝis nun tiel forte amis, povis ilin forlasi kaj foriri por ĉiam. Tion li ne povus elteni.

Tiun, kiun li ofte nemerite ofendis, ignoris kaj malĝojigis, tiu, kiu malgraŭ ĉio restis fidela edzino kaj perfekta patrino.

La tagoj pasis malrapide kaj penige. La kuracistoj donis esperon, ke post la operacio venos pliboniĝo kaj ke kemiterapio helpos. Ŝi restis sen siaj belegaj hararoj, maldikiĝis nerekoneble. Post ĉiu seanco, tiel dolora, ŝi ne havis fortojn eĉ ĝoji. Pasis du jaroj en atendado de la malklara morgaŭa tago. Lia negoco malprogresis. La ŝparita mono finiĝis. Ljudi komencis ludi en restoracio por helpi la familion, sed ne ĉesis la studadon. La komisiono de lia patrino, ke li devas fini la universitaton, li ne forgesis. La jaroj pasis inter stabiliĝo kaj kemioterapio. Sed la fatala fino estis neevitebla.

Li ne iris al la tombo – ne volis tiun memoron pri lia patrino akompani liajn estontajn tagojn. Li volis memori ŝin bela, rideta, amema, ludanta sian ŝatatan sonaton de Mozart.

La salono estis plenplena. La bruo de la enirantaj kaj okupantaj siajn lokojn vizitantoj, iom post iom silentiĝis. La lumo estingiĝis, nur la sceno restis malmulte lumigita.

La streĉo plialtiĝis. Kvazaŭ ie malproksime oni aŭdis la unuajn tonojn de la Mozarta sonato. La pianisto, klininta kapon al la piano, kun amo kaj tristeco tuŝetis la klavojn, kiuj disjetante la tonojn, brakumis la salonon kaj tenere tuŝis la aŭskultantojn per la supernobla melodio, elfluinta el la instrumento. Je la unua vico, maldekstre, griziĝinta kaj dorskurbiĝinteta de la jaroj kaj la tristeco, sidis viro kun sep ruĝaj rozoj en la mano.

verkis kaj sendis **Ivaniĉka MAĜAROVA**, Razgrad,  
Bulgario

HILDA DRESEN rimarkis la nerimarkatan

naturon en la vento:

*Kion diri, kiel miri!  
Ĉe vojfino sur ruino  
forlasite, homevite  
en rubaĵo kreskis flor'.*

*La burĝonoj inter ŝtonoj,  
jam kun revo pri diskrevo  
ĝojsalutas, ja surŝutas  
ilin sun' per sia or'.*

*En rubaĵo kun kuraĝo  
floro floras, vivon gloros,  
bluos, bluos kaj instruos  
ion al la homa kor'.*



*La venton nur kuraĝ' imponas,  
nur hom' de l' sankta malkviet',  
al li ĝi frate manon donas,  
ke li kunkuru kun impet'.*

*Ĝi volas, ke dum kur' ekardu  
kaj palon perdu lia vang',  
ĝi volas, ke la hom' sin hardu  
kaj ŝtorme fluu lia sang'.*

Indas iom pripensi la nocion: “sankta malkvieto”. Kion per tio celas la poetino? Malkvieton oni ĝenerale konsideras ne bona afero, fakte malbona anim-stato por tiel diri, ĝi parencas al zorgoj pro okazaj malbonoj, al anksio kaj timo. Sed la akompana epiteto “sankta” nobligas la nocion, faras la maltrankvilon nutranto de kuraĝo kaj vivplena ardo.

Sed malgraŭ tia firma preno de kuraĝo Hilda Dresen pli tendencas al kvieto kaj melankolio en siaj natur-temaj poemoj:

*La silento muta  
en la ĉambron fluas,  
dum sopir' akuta  
la animon skuas*

ŝi diras en sia poemo Somernokto. Fakte, ŝiaj natur-poemoj preskaŭ senescepte sugestas aŭ indikas ekster si mem al subtila anim-stato de melankolio aŭ sopiro. Tamen neniam sintrude, Hilda scias precize ekvilibrigi siajn esprimojn. Sed ŝia humoro povas ankaŭ ribeli kontraŭ la danĝeroj de deprimado, eĉ per senkompataj, insultaj vortoj kontraŭ ŝi mem.

La poemo Malbenita humoro komenciĝas en printempa suno, kiu “la tutan mondon oras”, tamen ŝian koron “morno boras”: ŝi antaŭsentas deprimon, kio ĝenas ŝin, timigas ŝin, sufokas ŝin,

*Kaj por elŝiri min el ĉi sufoko  
mi min insultas kun incita moko:  
Diable! Vi bezonus bonan frapon  
au freŝan akvon sur la pendan kapon.*

Sian libron la poetino dividis en kvin partojn, kiujn ŝi nomis per titoloj pli-malpli temaj: Sezonoj, Floroj, Tenero, Humoroj kaj Pensondoj. La du unuajn oni povas rigardi kiel plej esencajn al la koro de la poetino, ŝi estas antaŭ ĉio amanto de la naturo kaj el siaj memoroj kaj spertoj pri la naturo ŝi plej facile

**P**er tiu ĉi poemo finas sian solan originalan poemlibron la estona poetino Hilda Dresen. La libro nomiĝas Norda naturo (1967) kaj la titolo de la poemo ne estas io aparta, sed simple ripeto de la unua linio. Kaj ja indas tia ripeto! Ĉar temas pri io, kion ni homoj kutime ne rimarkas, kaj des malpli taksas valore signifa. Estas floreto levanta sian blupon sur rubaĵo ĉe iu vojfino.

Sed la poetino ĝin rimarkas, kaj laŭ sia poeteca naturo ŝi scias kombini observon kaj sentemon en transiran sperton. Kaj kia estas tia transira sperto? Ĝi estas agnosko de vivo ŝajne sensignifa kaj nerimarkinda, ke ankaŭ tia vivo havas valoron, kaj kiel tiu valoro povas instrui al la homa koro respekton al ĉia vivo.

Hilda Dresen (1896-1981) naskiĝis en Harju-distrikto en Norda Estonio. Ŝi studis en knabina mezernejo en Tallinn kaj laboris ĉe la estona poŝto ekde 1916 ĝis sia emeritiĝo en 1956, komence kiel telegrafistino kaj poste kiel radio-telegrafistino. Ŝi esperantistiĝis en 1913, tiam 17-jara, kaj komencis labori poezie en Esperanto en 1922. Ŝi mortis en 1981.

Hilda pasigis siajn knabinan jarojn en arbaro-riĉa regiono, kie ŝia patro laboris kiel forstisto. Sendube ŝia sindoneco al la naturo devenas el ŝia elkresko inter la arboj kaj la floroj de ŝia hejmloko. Oni ankaŭ trasentas la influon de la sezonoj sur ŝian menson, precipe de aŭtuno kaj vintro. La norda vento el trans la Finna Golfo sentigas sin dum sia senripoza galopado tra la ebenaĵo, ĝi trapenetas la timeman homon sur la vojo, kaj la kaŭrantaj inertuloj, serĉantaj ŝirmon, nur incitas la venton kaj plifirmigas ĝian senindulgemon. Sed la poetino rekonas ian spiritan

prenas temojn, kiujn ŝi scias profundigi per ligoj al homaj cirkonstancoj kaj kondiĉoj. Simple kortuŝa estas ekzemple ŝia poemo Marto milittempa:

*Kia sensuna marto!  
Neĝas, neĝas sen halto.  
Per kvieto sensona  
kaj falad' monotona  
volas la neĝo luli,  
trankviligi la korojn,  
el la anim' forruli  
la ĉagrenajn memorojn,  
volas, ke ree pure,  
pure kaj senmakule  
brilu neĝo per blanko  
sur verŝita homsango.*

Kiel tradukisto Hilda Dresen estis multe pli produktiva ol kiel originala poeto, kaj laŭdire ŝi rigardis sin pli kiel tradukinton ol originalan poeton. El kvanta vidpunkto oni ja povas agnoski ŝian pravon pri tio. Ŝia unua traduko estis Elektitaj versaĵoj (1929) de Marie Under (1883-1980), unu el la plej grandaj poetoj de Estonio en la lasta jarcento. Sekvis diversaj tradukoj de poezio, i.a. kunlaborado ĉe la Estona antologio (1932). Elstaras ŝia traduko de fragmentoj el Kalevipoeg, la popola eposo de Estonio (1975).

de **Baldur Ragnarsson**

(**Juna amiko**, n-ro 117, 2006)

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/dresen.html>

## el la literaturaj paĝoj de Monda Asembleo Socia (MAS)

tradukis Vilhelmo Lutermano el Kubo

**Franco KAFKO (Franz Kafka) \* Rakontoj**

### Distrita elrigardo

**K**ion ni faros dum tiuj printempaj tagoj, kiuj nun rapide venos? Ĉi matene la ĉielo estis griza, sed se oni nun iras al la fenestro, oni estas surprizita kaj apogas la vangon ĉe la klinko de la fenestro.



Sube oni vidas la lumon de la suno - ja certe jam sinkanta - sur la vizaĝo de infaneca knabino, kiu tiel iras kaj retrorigardas, kaj samtempe oni vidas la ombron de viro sur ĝi, kiu pli rapide venas malantaŭ ŝi.

Poste la viro estas jam preterpasinta kaj la vizaĝo de la infano tute hela.

### La hejmenvojo

**O**ni vidu la konvinkoforton de la aero post fulmotondro! Miaj meritoj aperas antaŭ mi kaj kun granda impreso superfortas min, kvankam, estas vere, mi ne kontraŭstaras.

Mi marŝas kaj la rapido estas la rapido de tiu ĉi stratflanko, de tiu ĉi strato, de tiu ĉi kvartalo. Mi estas prave respondeca pri ĉiuj frapoj kontraŭ pordoj, sur tabloplatojn, pri ĉiuj tostoj, pri la amparoj en siaj litoj, en la skafaldoj de novaj konstruaĵoj, en mallumaj stratetoj premitaj kontraŭ dommuroj, sur la divanoj de bordeloj.

Mi taksas mian pasintecon kontraŭ mia estonto, sed trovas ilin ambaŭ elstare bonaj, ne povas doni

preferon al iu el ambaŭ kaj devas nur mallaŭdi la maljustecon de la sorto, kiu tiom favoras min.

Nur kiam mi enpaŝas mian ĉambron, mi estas iomete pripensema, sed sen ke mi dum la ŝtupara supreniro estus trovinta ion pripensindan. Ne multe helpas al mi, ke mi komplete malfermas la fenestron kaj ke en iu ĝardeno ankoraŭ ludas la muziko.



### La preterkurantoj

**S**e oni promenas nokte tra strateto, kaj viro, videbla jam de malproksime - ĉar la strateto antaŭ ni supreniĝas kaj estas plendluno - kuras renkonte al ni, tiam ni ne haltigos lin, eĉ se li estas malforta kaj ĉifonvestita, eĉ se iu kuras post li kaj kriegas, sed ni lasos lin plukuri.

Ĉar noktas, kaj ni ne kulpas, ke la strateto antaŭ ni en plendluno supreniĝas, kaj krome, eble tiuj du aranĝis tiun pelkuradon por amuziĝi, eble ambaŭ persekutas iun trian, eble la unua estas persekutata senkulpe, eble la dua volas murdi, kaj ni fariĝus kunkulpantoj de la murdo, eble la du scias nenion unu pri la alia, kaj ĉiu kuras nur je sia propra respondeco en sian liton, eble ili estas noktambuloj, eble la unua havas armilojn.

Kaj fine, ĉu ni ne rajtas laci, ĉu ni ne drinkis tiom da vino? Ni feliĉas, ke ankaŭ la duan ni ne plu vidas.

### La pasaĝero

**M**i staras sur la platformo de elektra tramo kaj estas totale malcerta pri mia pozicio en tiu ĉi



mondo, en ĉi urbo, en mia familio. Eĉ preterpase mi ne povus diri, kion mi povus prave pretendi en ajna direkto. Mi tute ne povas pravigi, ke mi staras sur tiu ĉi platformo, ke mi tenas min per ĉi maŝo, lasas min porti de tiu ĉi tramo, ke homoj evitas la tramon aŭ iras mute aŭ ripozas antaŭ la montrofenestroj. - Estas vere, ke tion neniu postulas de mi, sed tio estas al mi egala.

La tramo proksimiĝas al haltejo, knabino stariĝas antaŭ la ŝtupojn, preta je eliro. Ŝi aperas al mi tiom klare, kvazaŭ mi estus ŝin pripalpinta. Ŝi estas nigre vestita, la jupofaldoj preskaŭ ne moviĝas, la bluzo estas streta kaj havas kolumon el blanka puntaĵo, la maldekstran manon ŝi tenas plate ĉe la vando, la ombrelo en ŝia dekstra mano staras sur la dua plej supra ŝtupo. Ŝia vizaĝo estas bruna, la nazo, ĉe la flankoj iomete presita, finiĝas ronda kaj larĝa. Ŝi havas abundan brunan hararon kaj disblovitajn haretojn ĉe la dekstra tempio. Ŝia malgranda orelo alsidas strete, sed mi vidas, ĉar mi staras proksime, la tutan dorson de la dekstra orelkonko kaj la ombron ĉe la radiko.

Tiutempe mi demandis min: Kiel fariĝas, ke ŝi ne miras pri si, ke ŝi tenas la buŝon fermita kaj diras nenion tiuspecan?

### Vestaĵoj

**O**fte, vidante vestaĵojn kun plej diversaj faldoj, ruŝoj kaj pendaĵoj, kiuj sur belan korpon kuŝiĝas bele, tiam mi pensas, ke ili ne longe konserviĝas tiaj, sed ricevas faldojn ne plu gladeblajn, ricevas polvon, kiu, dike en la ornamaĵo, ne plu forigeblas, kaj ke neniu emus fariĝi tiom malgaja kaj ridinda por vesti ĉiumatene la saman altvaloran robon kaj vespere demeti ĝin.

Sed mi vidas knabinojn, kiuj certe estas belaj kaj montras multoble ĉarmajn muskolojn kaj maleletojn, streĉitan haŭton kaj amasojn da delikataj haroj, kaj tamen ĉiutage aperas en tiu sola natura maskokostumo, en la samajn manplatojn metas ĉiam la saman vizaĝon kaj reflektigas ĝin en sia spegulo.

Nur kelkfoje vespere, kiam ili malfrue revenas de festo, en spegulo ĝi ŝajnas al ili eluzita, ŝvelinta, polva, de ĉiuj jam vidita kaj apenaŭ plu portebla.

### La malakcepto

**S**e mi renkontas belan knabinon kaj ŝin petas: "Estu afabla, venu kun mi" kaj ŝi preterpasas mute, per tio ŝi celas:

"Vi ne estas duko kun fluganta nomo, ne larĝa Amerikano de indiana kresko, kun horizontale

ripozantaj okuloj, kun haŭto masaĝita de l' aero de gazonejoj kaj de riveroj ilin trafluantaj, vi ne faris vojaĝojn al la grandaj lagoj kaj sur ili, kiuj troveblas mi ne scias kie. Do, mi petas, kial mi, bela knabino, iru kun vi?"

"Vi forgesas, vin ne portas aŭtomobilo en longaj puŝoj balancante tra la strato; mi ne vidas la sinjorojn de via sekvantaro, premitajn en siaj vestaĵoj, kiuj iras malantaŭ vi en preciza duoncirklo murmurante por vi benojn; viaj mamoj estas en korsaĵo bone ordigitaj, sed viaj femuroj kaj koksoj kompensas al si tiun sindetenon; vi portas traftorobon kun plisitaj faldoj, kia ĝi lastan aŭtunon nin certe ĝojigis, kaj tamen vi ridetas - tiun vivdanĝeron surkorpe - de tempo al tempo."

"Jes, ni ambaŭ pravas, kaj por ne konsciiĝi pri tio nerefuteble, ni prefere iru, ĉu ne, hejmen ĉiu sola."


elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo  
\*\*\* publikigita kun permeso de la tradukanto \*\*\*

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/kafka.html>

\* Franz KAFKA naskiĝis la 3-an de julio 1883 en Prago, mortis la 3-an de junio 1924 en Kierling [Kirling] (Aŭstrio) estis aŭstra germanlingva verkisto de noveloj kaj mallongaj rakontoj.

### Okazo en buso


**En buso foje dum vetur' okazis jena aventur':  
Oscedis larĝe iu viro tutfaŭke kun muĝanta spiro.  
Tuj indigniĝis najbarin':  
"Sinjoro, ne formanĝu min!"  
Al tio voĉis li refute:  
"Porkaĵon mi ne manĝas tute".  
"Ho, certe, mi memoras - azenoj sole herbon volas!"  
... Kaj la publiko miris nur pri la nivelo de kultur'.**



## Pri fantomoj

-- amuze rakontas Maurizio Brucco el Hispanio

**S**aluton karaj !  
Hodiaŭ, ĉar ĉi tiu bildo temas pri fantomoj, mi kaptos la okazon paroli al vi pri la koboldo kiu, tiel la folkloro rakontas, vivas kaŝante sin mem en la hejmoj de mia lando. Tre malbela kaj spitema. Ĝi ofte aperas nokte, kiam oni dormas kaj kutime post kiam oni manĝis tre multe.



Fakte tiuj, kiuj ĵuras kaj intense ĵuras ke ili vidis ĝin, raportas preskaŭ ĉiam la saman aferon: "jes, mi estis endormiĝonta kiam ĝi venis, ĝi sidis sur mian ventron, estis kiel havi pezan ŝtonegon sur mi, mi ne povis dormi la tutan nokton!". Ili rakontas ankaŭ pri aliaj spitoj faritaj de la fea estaĵo, ekzemple klasika estas la spito de la ĉevalo kies voston la kamparanoj trovas matene, post vekigo, nodata per strangaj harplektaĵoj.

Tamen la koboldo ne estas malbona, nur ŝercema. Kaj laŭdire, se vi kapablus preni la ĉapelon kiun ĝi ĉiam surmetas kaj kiun ĝi amegas, subite ĝi iĝus obeema kaj komplezema, ĝi preĝpetus ke vi redonu ĝin, kaj por rehavi ĝin ĝi kontentigus unu el viaj deziroj...

Kaj vi, miaj karaj, kio pri la fantomoj, feinoj, elfoj, gnomoj ktp de via lando?



sendis **Maurizio Brucco** el Hispanio

## Tranĉilakrigisto


tradukis kaj sendis Roland Platteau el Francio

Kvazaŭ rufa hundo septembris en vitoj,  
Nuntempe ĉe domo lumeto tremetas.  
Jen vento ĵuras deklivojn enblovas  
Razenon truadas la arbaĵ kalcinoj.

Paŝas sur remizoj antaŭtagiĝa pluv'  
La nudpieda pluv' sur frostantajn brutojn.  
La fenestro kadras migrantajn la birdojn  
Remantajn bronzaĵon en la aera griz'.

Poste restos al ni pan' kaj neĝo sole,  
Padeto glacia malsupre al valo.  
La ĉiel' kvarventa turnas karusele  
Kaj vintro sur grejso akriĝas tranĉilojn

poemo de **Luc Bérinmont**



esperantigis **Roland Platteau** el Francio  
8/9/2016 pensante al aŭtuno 2001 ĉe lago Der

## Ŝercoj



Du ĉasistoj, perditaj en arbaro, subite aŭdas teruran blekon de malsata tigro. Timigite de la tigra bleko, unu el ili tuj demetas siajn botojn por pli rapide kuri. La

alia ĉasisto ekridas:

- Tio neniel helpos vin, mia kara. Kun botoj aŭ sen botoj, vi ne sukcesos kuri pli rapide ol la tigro.
- Mi ne intencas kuri pli rapide ol la tigro -- diras la unua, ekkurante --. Mi volas kuri pli rapide ol vi.

\*\*\*

- La samo okazas ĉiutage. Ŝi ploras kaj kriegas ĉar ŝi ne volas iri al lernejo.

- Estas multaj knabinoj, kiuj havas tiun sintenon.
- Ne! Mi parolas pri mia patrino. Ŝi estas instruistino!

\*\*\*

Li:

- Karulino, nur rigardu - kia bela tago!

Ŝi kokete:

- Pri kio vi aludas?

Li serioze:

- Nu, iam vi mem diris, ke vi forlasus min en iu bona tago!

\*\*\*



Oni demandas al judo:

- Ĉu estas vera, ke judoj respondas ĉiam per demando?

- Kiu diris tion al vi?

\*\*\*

## Krucvortenigmo

-- el Semajno de Enigmoj

1	2			3	4		5
6			7				
		8				9	
10					11		

### SILABA KRUCVORTENIGMO

Skribu silabon en ĉiu kvadrato. Jen estas listo de bezonataj silaboj:

**BA, BE, BLI, ES, FLA, KO, KO, KU, KUR, LA, NO, PE, PER, PRO, RAN, RO, RO, SEN, SO, SO, STA, TA, TA, UR, VA, VER.**

### HORIZONTALAJ DIFINOJ ( → )

1. Fondi kaj aranĝi organizon; 3. Latuno (du vortoj); 6. Malobservo de religia aŭ morala leĝo; 7. Postulanta nenian pagon; 8. Individuo; 9. Rilata al urbo; 10. Libro, entenanta la diversajn tabelojn de difinita fako; 11. Montrilo.

### VERTIKALAJ DIFINOJ ( ↓ )

1. Proverbaro \_\_\_ (Zamenhof); 2. Bangladeŝa

monunuo; 3. Boteleto por parfumoj; 4. Grandspaca, malfermita; 5. \_\_\_ esperanta (Zamenhof); 7. Aparato por percepti temperaturon aŭ proksimecon; 8. Rilata al perlo; 9. Polusa aŭ bruna besto.

Fonto: Semajno de Enigmoj #4

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

*(La solvo de la krucvortenigmo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)*



**DUA PARTO - LA VIVO**



**63**

Tiu, kiu ekzercas la neagadon,  
kiu okupas sin kun la senokupeco  
kaj trovas guston je tio, kio ne bongustas,  
vidas la grandan en la negranda kaj la multan  
en la malmulta.

**Li repagas grumblon per VIVO.**

**Planu la malfacilan tiam, kiam ĝi estas facila ankoraŭ!**

**Faru la grandan tiam, kiam ĝi estas malgranda ankoraŭ!**

**Ĉio malfacila surtere komenciĝas ĉiam kiel facila.**

**Ĉio granda surtere komenciĝas ĉiam kiel malgranda.**

**Tial la saĝulo faras neniam ion grandan,  
tiel li povas perfektigi siajn grandajn agojn.  
Tiu, kiu facile promesas ion,  
certe ne malofte rompas la promeson.**

**Kiu traktas multajn aferojn facilanime,  
tiu certe havas multajn malfacilaĵojn.  
Tial, ĉar la saĝulo pripensas la malfacilaĵojn,  
li havas ilin neniam.**

**Rimarkoj de Anniespera:**

Vilhelmo:

„Tiu, kiu ekzercas la neagadon,  
kiu okupas sin kun la senokupeco  
kaj trovas guston je tio, kio ne bongustas,  
vidas la grandan en la negranda kaj la multan en la malmulta.

Li repagas grumblon per VIVO.“

Pri tiuj ĉi frazoj, en Ĉinio la pli komuna kompreno estas tiel (cititaj el la traduko de Wang Chongfang):

„Rigardu „senagadon“ kiel agon,

Senafercon kiel aferon,

Sengustecon kiel guston.

Kiel ajn malamikaj kontraŭ mi aliaj estas,

Mi ĉiam repagas al ili per „Virto“.

(daŭrigota)

**Poeziaĵoj de Ilir Zhiti tradukis kaj sendis Baardhyl Selimi el Albanio**

<p><b>Ĉu mi estis sonĝo?</b></p> <p>Ĉu mi estis sonĝo? Ĉu mi estis sonĝo, aŭ Dio vidis sonĝon, kio estis ja mia vivo!?</p> <p>Tirana, januare 2015</p>	<p>Nur momenteto, nur momenteto, disigas morton, disde la vivo.</p> <p>Nur momenteto, nur momenteto, dividas militon, disde la paco.</p>	<p><b>Feliĉaj ni estis nur tiam</b></p> <p>Neniam forgesos ni, kara mia, kiam freneze ni enamiĝis kaj por akiri feliĉecon ĉiutage ni kunrevadis</p> <p>Kio travivite neniam forgesitos Sed kial kvazaŭ trancxilo nian koron ĝi tuŝas kaj ni ne scias ĉu memoraĵo tio estas aŭ profunda doloro kiu multe bruligas.</p>	
<p><b>Nur momenteto</b></p> <p>Nur momenteto, nur momenteto, limigas nenion, disde miraklo.</p> <p>Nur momenteto, nur momenteto, donas nin abismon, aŭ feliĉecon.</p> <p>Nur momenteto, nur momenteto, dividas iluzion, disde la vero.</p>	<p>Nur momenteton, nur momenteton, distancas perdo, disde la profito.</p> <p>Nur momenteto, nur momenteto, dividas sukceson, disde simpla revo.</p> <p>Nur momenteto, nur momenteto, estos ni pro momenteto viktimo</p> <p>Tirana, julie, 2017</p>	<p>Sed ĉu tio plu valoras kiam malfrue ni komprenis Feliĉaj ni estis nur tiam kiam freneze enamiĝis.</p> <p>Plug-Lushnjë, aŭguste 1986</p>	

## Eva survoje al la kono

**P**araŝkeva-Eva Bojaĝieva – sciencisto kaj esperantistino de alta klaso, estas naskita kaj loĝas en Plovdiv, Bulgario. Ĉi-jare la urbo estas Eŭropa ĉefurbo de la kulturo.



Bojaĝieva estas specialisto pri bioĥemio. Pli ol 40 jaroj ŝi instruis en la Plovdiva Medicina Universitato al bulgaraj kaj eksterlandaj studentoj bioĥemion ankaŭ en angla lingvo kaj en la Universitato pri nutraĵteknologioj franclingve. Ŝi estas la unua aŭtoro de “ Biochemistry - guide book for practicals “, 2000 j. por alilandaj studentoj. Krome ŝi estas kunaŭtoro de Instrukajeroj pri bioĥemio, aŭtoro, tradukisto kaj recenzanto de multaj sciencaj verkoj. Ŝia doktora tezo estas kaj en Esperanto.

Bojaĝieva estas poligloto – uzas libere anglan, francan, rusan. Komprenas kaj parolas germanan, italan, hispanan, iomete rumanan, grekan, turkan, norvegan..... Krom tio ludis violonon, kantas, verkas...

Delonge ŝi instruas Esperanton enlande kaj eksterlande, eĉ en Havano, Kubo. Kiel fakulo-esperantistino estas recenzanto de dulingva Ĉeĥa-Esperanto vortaro pri kemio, redaktas lernolibron de Esperanto por bulgaroj. Estis ĵurio pri poezio de nevidantoj.

Ŝi estis elektita prezidanton de la Bulgara ILEI - sekcio. Estas Internacie Rajtigita Ekzamenanto (IRE) de ILEI, Profesoro pri bioĥemio ĉe AIS, San Marino, reprezentano de Bulgario en UMEA kaj TEC, organizis UMEA/IMEKonferencon en Plovdiv, 2005, kie kunorganizis IFEF Kongreson en 2002.

Kiel sciencisto partoprenas en naciaj kaj internaciaj sciencaj forumoj, ankaŭ per prelegoj en Esperanto dum UK-oj en multe da landoj, ne nur en Eŭropo. Lastsomere prelegis pri bioĥemiaj temoj en Lisbono kaj en San Marino. Regule partoprenas la Esperanto-Sumoon.

Ŝiaj du filoj ankaŭ estas aktivaj esperantistoj, ĉefe dank'al sia forpasinta patro.

Mi deziras al ŝi resti la ĉiama forta virino, utila kiel nun, ne nur al sia familio, sed ankaŭ al la granda Esperantista familio!

## verkis kaj sendis Elena Popova, el Bulgario



Unuaj pasoj ce la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), San Marino. La Respublika blazono estas videbla surmure.



Dum instruado al studentoj en la Medicina Universitato. 2015 j.



Inter geamikoj el diversaj landoj, UK en Roterdamo, 2008 j.

verkis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgario

## Ĉiela Fabelo (infanrakonto)

**E**n la unuaj tagoj de la mondo sur la ĉielo estis nek suno, nek luno kaj nek stelo. Se iu estus sur la tero, li vidus la senfinan mallumon rigardante la ĉielon. Tamen ne estis eĉ unusola paro da okuloj por rigardi.



Post iom da tempo la suno kaj la luno estis metitaj en la ĉielon. La ora giganto, la suno, kaj la arĝenta nano, la luno, alterne komencis regi la mondon.

La suno fariĝis lumo al la mondo. Sub ĝia reĝado kreiĝis vivo. La suno fariĝis viviga kaj gvida. Kiam la suno estis en la ĉielo, ĝi donis esperon al ĉiuj vivantaj aĵoj.

En la foresto de la suno, la luno regis la mondon. Ĝi aperis diversmaniere. Foje li staris sur la ĉielo kun sia tuta majesto, kaj foje kaŝiĝis malantaŭ la ombroj.

Ĉar la luno ne estis tiel granda kaj helbrila kiel la suno, ĝi ne povis lumigi la mondon tiel, kiel la suno. En ĝia tempo, la mondo endormiĝis kaj la vivo ĉesis. Birdoj ne kantis, homoj ne parolis, arbaroj fariĝis senhomaj. Predantoj plenigis ĉi tiun intertempon.

Dum tempo, nokto fariĝis io timiga. Ĝi enhavis mil specojn da minacoj. Ĉar nokte ne estis la konfido donita de la suno.

Pro tio la luno malamamis la nokton. Ĝi enviis la sunon kaj ties belaĵojn. Ĝi ne povis lumigi la mondon kaj ne povis doni esperon kaj konfidon al la mondo. Estis vivo sub la suno, sed morta silento sub la luno.

## Kiel Mihok instruis angle

**L**eŭtenanto Petroff singarde, iom post iom, ŝovis la kapon el sub la lana kovrilo, ĉirkaŭrigardis.

Hela taglumo en la ĉambro. Ekstere sennuba ĉielo. Verŝajne frosto. Li rigardis la termometron. La enĉambra temperaturo estis dekkvin gradoj super la nulo.

– Brrr! Nur dekkvin gradoj... Ekstere estas certe minus dudek kvin...


Aperis antaŭ li la ekzercejo. Liaj dentoj ekklaketas. Li ĵetis rigardon al la senfajra forno, alian rigardon al la poŝhorlogo, vigne tiktakanta sur la apudlita ŝranketo kaj poste, kovrante sin per la lantukego li kuntiriĝis kiel piktuŝita raŭpo sub brasikfolio.

– Ankoraŭ tro frue... estus bone dormeti iom! – kaj por provi tion li forte fermis la okulojn.

Senbrue, kiel la ombro, ŝtelis sin en la ĉambrom lia servisto Miĥaelo Mihok, pala stangostatura

## verkis kaj sendis Coşkun Atak el Turkujo

Pli kaj pli kreskis la ĵaluzo de la luno al la suno. Ĝi volis havi la potencon de la suno. Ĉiun vesperon, dum la suno subiris, ĝi komencis ŝteli pecon de la suno. Ĉiunokte ĝi ŝtelis malgrandan pecon de la suno kaj algluis ĝin al la ĉielo. La pecoj nomitaj steloj faris la nokton pli luma.



Tiel, dum jarcentoj vespere la ĉielo pleniĝis je steloj. La nokto ne plu estis io timiga. La luno fiere regis la nokton kiel la plej brila aĵo inter la centoj de steloj sur la ĉielo. La noktoj fariĝis pli brilaj ol la tagoj.

Aliflanke, la suno ne estis tiel granda kaj brila, kiel antaŭe. Ĝi pli kaj pli perdis sian potencon kontraŭ la luno ĉiunokte kaj fariĝis malpli fidinda. La nokto, kiu estis iam minaca, fariĝis fidinda afero.

lun tagon; vespere je la fino de tempo, la luno ŝtelis la lastan pecon de la suno kaj mortigis ĝin. Tiel la tago falis en mallumon. La nokto fariĝis pli hela ol la suno estis iam ajn. La luno atingis absolutan potencon enkorpigante en la potencon de si mem la lumon de ĉiuj partoj de la suno. Bedaŭrinde ĝi ne multe povis teni ĉi tiun potencon.

La luno rapide komencis perdi sian lumon kaj baldaŭ falis en mallumon. Ĝi ankaŭ mortigis la stelojn, al kiujn li donis vivon. La luno, kiu ne sciis, ke ĝi prenis sian lumon de la suno, tial ankaŭ mortigis sin.

Do, la mondo denove plonĝis en eternan mallumon.

verkis kaj sendis **Coşkun Atak** el Turkujo

-- de Julio BAGHY

militkaptito. Sub la dekstra brako li premis al si faskon da ligno, sub la maldekstra – pajlaĵon en malnova gazeto, kaj en la manoj li tenis grandan samovaron. Li penadis paŝadi laŭeble senbrue kaj piedpinte. Ĉe ĉiu paŝnaro, glastinto, kulerfalo, seĝrenverso li time kaj respektplene palpebrumis al la lito, kie sub la kovrilo, kvazaŭ minace, montetiĝis la grasa kaj nenomebla parto de la sinjoro leŭtenanto.

Miĥaelo Mihok jam laŭnature estis timema, servema kaj ĝentila. La servemon kaj ĝentilecon li bone profitigis en sia civila profesio. Li estis tajlorlaboristo en provinca urbeto. Sed li ankaŭ estis timema. Precipe li timis leŭtenanton Petroff, kiun li konis nur de tri tagoj. Ho, kiaj tri tagoj! Vera malfeliĉo, ke oni komandis lin ĉi tien! Escepte kelkajn frazojn li ne komprenis la rusan lingvon. Bonvole li klopodis plenumi la dezirojn, sed la timo ofte paralizis liajn



kapablojn. Ne mirinde, ĉar leŭtenanto Petroff estis fortika, grasa, bizonstatura kaj havis leonvoĉon. Certe li devas esti kruela tigro – pensis Mihok.

Ĉiumatene kaj ĉiuvespere ili havis konversacion. Tiaj eĉ pli firmigis lian opinion. Petroff klarigis ĉion per man- kaj piedgestoj, per mimiko kaj diversaj akrobatagoj por komprenigi sin kaj dume aŭdigis leonvoĉon. Mihok streĉis sian atenton, igis ekfunkcii sian etan fantazion por diveni la signifojn de tiuj misteraj manovroj, kiujn faris kun plena energio kaj fervoro la leŭtenanta moŝto. Tamen sinsekvaj miskomprenoj maldolĉigis lian vivon. Nu kaj tiuj turmentaj kapdoloroj, kiuj sekvis la atentostreĉon!? Ankaŭ tio estis iom pli ol nenio.

Sed kial ne lernis Mihok la rusan lingvon? Pro du kaŭzoj. Unue, ĝis nun li nur vidis la rusojn, sed ne vivis inter ili; due, ĉar li vere ne havis lingvistan talenton. Krom tiuj du estis ankoraŭ tria. Li estis revemulo. Tiu ĉi revemo instigis lin lerni Esperanton. Oni instruis tion en la militkaptitejo. Li do komencis kaj finlernis ĝin. Oni ne povu diri hejme, ke dum longa foresto li ne profitis ion pli utilan ol tiu malbenita nazkataro, kiun li nepetite ricevis en la subteraj barakoj de Tockeo. Tiu ĉi lingvoscio estis triumfo por li, ĉar malgraŭ penoj kaj elspezoj li ne kapablis lerni fremdan lingvon. La mono ĉiam formigris kaj lia cerbo nur nigris. Sed nun eĉ lia revemo havis freŝan nutraĵon. Li posedas lingvon, kiu egalvaloras ĉiujn, ĉar ĝi estas parolata ĉie, kvankam ne de ĉiu. Sed tio estas pretera bagatelaĵo. Li sentis sin grava persono, pioniro de kulturmovado kaj en sia revo li jam fondis la "In-Tu-As-Es-Ta-He"-n (Internacia Tutmonda Asocio de Esperantistaj Tajlorhelpantoj) kun speciala insigno: verda stelo, trapikita per pinglo kaj kudrilo. Li estos la prezidanto kaj tiam li provos sendanĝere svati la manojn de Rozinjo. Ho Rozinjo, Rozinjo, belega modpupforma filino de kruela majstro, kiu ofte mezuris la ulnon al lia dorso dum la lernojaroj, se vi konjektus la dolĉan sekreton de Mihok, tiam vi certe ne turmentus la patran koron per ĉiutaga "neniu edzinigas min... mi devas fariĝi maljuna fraŭlino kun papago kaj kun dekduo da katetoj". Pri la kruela majstro, kaj precipe pri la ulno subite venis ideo, kiun Mihok dorlote vartis en si. Li konsideris sin martiro de tiu ĉi movado. Ĉu ne estis martireco suferi vangofrapojn de kolonelo pro la kvinpinta stelo? Certe jes. La vangofrapoj koncernis verŝajne la kvinpinton kaj ne la koloron, sed tiaj bagateloj ne gravas. Martiro estos la edzo de la belega modpupforma Rozinjo... Tia vireto estis Miĥaelo Mihok.

Sed nun la neforpelebla realeco devigis lin servi ĉe tiu ĉi bizonstatura leonvoĉa leŭtenanto, kiu ĉiutage torturas lin per misteraj gestoj, grimacoj,

nekompreneblaj akrobataĵoj. Hja, tia estas la sorto!

Li faris fajron en la forno, starigis la samovaron antaŭ ĝin, alĝustigis tubeton, kies finon li metis en la aperturon de la forno. Tie estis forta aertiro. Poste li pretigis ĉion por la sinlavado de la leŭtenanta moŝto; malplenan sitelon, sapon kaj glason da akvo.

Dume leŭtenanto Petroff transdonis sin al la kutima frumatena meditado pri la vivo, pri variado de ŝancoj. Antaŭ unu jaro en Petrograd li fiere paradis en sia nova uniformo sub fenestroj de bela vidvino de tiea komercisto. Li havis esperon kaj imponajn pagonojn, sed venis la revolucio kaj la vidvinon kune kun la kapitalo edzinigis prudenta komisaro. Liaj esperoj kaj pagonoj falis en la koton kaj la sinsekvaj bataloj pelis lin ĝis la ekstrema oriento. La pagonojn li denove havis, sed kia vivo?! Brrr! Li estas ja pacema kiel... kiel tajloreto kaj tamen ĉi tie... en la "inĝeniera bataliono..." Ĉe tiu vorto li ekmiris. Kial oni nomas ĝin "inĝeniera"? Eĉ unu inĝeniero ne troviĝas inter la oficiroj. Profesie li estas ja simpla dentisto, eĉ ne doktoro... La kapitano estas notario, la... Eble la kolonelo? Ne! Tute ne! Li havas kolbasfabrikon en Udinsk... Kial "bataliono"? Tridek ses oficiroj, kunkpeditaj de revoluciaj ventegoj, jam estas bataliono? La soldataro konsistas el kvin dungitaj ĥinoj. Ili flegas ok mizerajn ĉevalojn en la staloj kaj ĉiumatene tiras du kanonojn sur la ekzercejon. Krome estas pli ol kvardek komanditaj militkaptitoj por servi ilin kaj kuiri nemanĝeblaĵojn por la oficiraj stomakoj... Bah, kia vivo? Pli profite estus eltiradi la dentojn de pacemaj veantoj en Petrograd ol ĉi tie tremadi por la propra vivo kaj ĉiutage prepariĝi por subitaj atakoj de bolŝevikoj... Kion fari? Jes, rifuĝi, sed kiel kaj kien?... Kaj ĉi tiuj dungitaj ĥinoj kaj komanditaj militkaptitoj eble...

Mihok plenumis sian taskon. Ĉio estis en ordo. Li paŝis al la lito, delikate tuŝis la leŭtenantan moŝton. Delikate, sed ne en feliĉa momento. La vigla fantazio de Petroff ĵus skizis teruran situacion, en kiu la ruzaj ĥinoj kun la militkaptitoj konspiris kontraŭ la oficiroj. Kiam Mihok ektuŝis lin, ĝuste en tiu momento li vidis sin trapikita de sia servisto. La tuŝon li sentis kaj por sin defendi kaptante la revolveron el sub la kusenoj li salte leviĝis kun domskua krio. La malfeliĉa Mihok pro teruro faligis la tason da teo, mortpale humile palpebrumis jen al la danĝera ilo, tenata kontraŭ lia brusto, jen al la terurtaŭzita mieno de la leŭtenanto.

Longminuta paŭzo. Petroff vidante la tremantan kapon de Mihok tuj embarasiĝis. Li sentis honton kaj, por kaŝi ĝin, laŭte ekridis. Mihok pensante, ke ridi estas devo, kiam la mastro ridas, ankaŭ li altrudis mucidan rideton je siaj kurbiĝintaj lipoj. Lia mieno similis al tiu de citron-glutanto, kiu volas ŝajnigi, ke la

citrono estas mielĉokolado. Petroff nun plengorĝe kaj sincere ridigis, ŝetis la revolveron sur la liton, rigardis la termometron. Ĝi montris dudek kvin gradojn.

– Haroŝo! (Bone!) – li diris kaj enlitiĝis.

Mihok kun tremantaj manoj kolektis la rompitaĵojn, zorge forbalais la splitojn, por ke ili ne vundu la piedojn de la leŭtenanta moŝto, pretigis teon en la glason kaj el respektinda distanco proponis ĝin.

– Gospodin... eto ĉaj... ĉaj... pitj (Sinjoro, jen, teo, tetrinku!).

– Nu, haroŝo... blagodarju vas... (Nu, bone, mi dankas).

Petroff trinkis, Mihok staris ĉe la forno. Kun premegita koro li pripensis la ĵus forpasintan teruraĵon. Lia timemo vestis la estontecon en nigran funebtron, ĉar li estis nun tute konvinkita, ke la sinjoro leŭtenanto estas tigro.

Dum la tetrinko Petroff projektis kelkajn planojn por la rifuĝo. Malagrabla estus kuŝi traborite per kuglo, tiradi dentojn estus pli prudente. El la planoj taŭgis neniu. Hazarde lia rigardo trafis Mihok-on, dancanta je unu piedo al la alia kaj hundokule observante liajn movojn, kaj nova ideo venis, facile efektivigebla. Onidire la militkaptitoj baldaŭ hejmeniros. Estus bone vojaĝi kun ili en Eŭropon. Bedaŭrinde krom la rusa li ne konas alian lingvon. Nu li devas lerni! Sed de kiu? Memkompreneble de Mihok. Li estas eŭropano, aspektas inteligenta, li nepre devas scii kelkajn lingvojn. Tiu ĉi nepre tuj fariĝis lia fiksa ideo.

– Herr Mihok... gavoritje pa germanski? (Sinjoro Mihok, ĉu vi parolas germane?) – li komencis leonvoĉe.

Mihok ektemis. Li komprenis nenion krom la vorto "germanski". Verŝajne la leŭtenanta moŝto bonvolis interesiĝi ĉu li vidis jam germanon? Li vidis ja. Kion fari? Eble ne estas kulpo vidi germanon kaj humiltone li informis la tignonaturan sinjoron.

– Da! (Jes!)

– Nu haroŝo... i pa francuski? (Nu bone kaj france?)

Mihok iom pripensis la demandon, esploris en siaj memoroj. Kie li vidis francon? Ah, jes! En la modgazetoj ĉe lia majstro. Certe tiuj bildoj figuris francojn, ĉar la gazeto venis el Parizo.

– Da, da! – li respondis post ioma konsidero.

– I toje pa angliski? (Kaj ankaŭ angle?)

Mihok embarasiĝis. Nun jam li tute ne komprenis la leŭtenantan moŝton, sed por daŭra pripensado li ne havis tempon, ĉar okuloj kvazaŭ trapikis lin. Li rapidis do respondi.

– Dadada!

– Ĉto dadada? (Kio jesjesjes?)

– Niĉevo! (Nenio!)

– Ĉto niĉevo?

– Niĉevo dadadada njet! (Nenio jesjesjesjes ne!)

La sensenca respondo pruvis, ke Mihok miskomprenis lin, sed tamen Petroff pensis, ke eŭropano nepre devas paroli tiujn lingvojn. Mihok aspektas inteligenta, estas eŭropano, li do parolas tiujn lingvojn. Petroff provis alimaniere komprenigi sin. Li montradis al diversaj objektoj de la ĉambro kaj leonvoĉe demandis, pensante, ke la tono plialtigita helpas en la interpretado.

– Pa germanski... pa francuski... pa angliski?

Mihok iom post iom ekkomprenis pri kio temas kaj tiam elbalbutis la lastan frazon de sia rusa lingvoprovizio.

– Ja nje znaju! (Mi ne scias!)

Leŭtenanto Petroff ne volis kredi je siaj oreloj, eble li malbone aŭdis. La konsterniĝo kvazaŭ tondris en lia voĉo.

– Ĉto vi nje znajtje? (Kion vi ne scias?)

Pizograndaj ŝvitgutoj aperis ĉe la tempioj de Mihok. Li pensis, ke tiu ĉi terura homo certe mortpafos lin, se li ne scias ĉion, kio estas postulata. La malesperiga situacio donis al li genian ideon, kiu savos lian vivon almenaŭ por la momento. Kiam Petroff persistis plu en montrado kaj demandado, volante scii germane la vorton seĝo tiam li senhezite respondis.

– Das seĝungen.

– Pa francuski?

– Le seĝ.

– I pa angliski?

– The siĝ.

Petroff estis kontenta, sed por tute konvinkiĝi li komencis novan provon montrante tra la fenestro al tureto, kiu staris sur la ekzercejo de la urba fajrobrigado.

– Nu, Herr Mihok, pa germanski?

– Der turung.

– Pa francuski?

– La Eiffel.

– Pa angliski?

– Krevu tuj, se mi scias! – eliĝis la amareco el Mihok.

– Krevutuj... Da, da, da... oĉĉĉen interesni (tre interese!)... Krevutuj...

La apetito de Petroff ĉiumomente pliiĝis por la fremdaj lingvoj. Li decidis formanĝi ilin. Per gestoj, grimacoj kaj akrobataĵoj li tuj klarigis al Mihok, ke li devos ĉe ĉiu sunleviĝo preni libron kaj instrui lin, kaj Mihok komprenis, ke li devas la sunon forŝteli de la ĉielo, meti ĝin en la Biblion kaj per la Sankta Libro li devos kelkfoje bati la kapon de la leŭtenanta moŝto. Sed kiel li kuraĝus fari tion? Bati la kapon de la sinjoro

leŭtenanto?!

Petroff ellitiĝis, lavis sin per plenbuŝo da akvo kaj post la finvestado li amike frapetadis la ŝultrojn de Mihok, kiu preskaŭ terenfalas pro tiu ĉi intimaĵo. Kiam Petroff estis ekster la domo, li surgenue, kiel bona katoliko, promesis dekduon da kandeloj al Sankta Antonio, se li forkondukos lin sana kaj nekripligita el la manoj de tiu ĉi tigranatura sinjoro.

La tagoj pasis. Ĉiu mateno alportis sian kvarlingvan torturon. Petroff demandis, Mihok respondis kaj ĉe la fino li promesis ĉiam unu dekduon da kandeloj.

Iun tagon Petroff surprizis lin, ke li decidis lerni nur la anglan lingvon kaj li jam aĉetis kajeron, krajonon por noti ĉion necesan. Mihok sentis batadi la koron en sia gorĝo. Kion fari? Ĝis nun estis facile, ĉar la leŭtenanta moŝto nenion notis kaj forgesis ĉion ĝis la alia mateno. La kajero kaj kraĵono malebligas la devigatan trompon. Li decidis konfesi, ke lia angla scio egalas la nulon, sed en la lasta momento rigardante la bizonstaturan leŭtenanton li rememoris pri la revolvero kaj rezignis. Venu, kio devas veni! Ankoraŭ kelkaj funtoj da kandeloj pli aŭ malpli al Sankta Antonio ne multon diferencos kaj li sisteme komencis instrui Esperanton nomante ĝin angla lingvo.

Petroff montriĝis entuziasma anglofilo. Li diligente lernis ĉie: en la kazino, sur la ekzercejo, en la oficira manĝejo, en la intima ĉambreto de... sed tio ne apartenas al tiu ĉi historio.

Foje dum promeno li rimarkis ilustritan revuon, kuŝantan sur la trotuaro. Kelkaj ĉifitaj folioj de la malnova "The London News". La titolo frapis lian atenton.

– Londono estas metropolo en Anglujo – li komencis konkludadi – tio estas certa. Nun ĉar la titolo diras "London", pli ol verŝajne la gazeto venis el London kaj se ĝi venis el London, sekve ĝi estas angla gazeto. Nu, ni kontrolu nin!

Li levis la foliojn, singarde glatigis ilin kaj provis legi kelkajn liniojn. Li ne komprenis. Iom ekscitite li rigardis ĉiujn paĝojn kun la espero, ke li trovos almenaŭ unu kompreneblan frazeton. Ne, ne kaj ne! Pro diablo, kiel povas okazi, ke eĉ vorteton li ne komprenis.

Konsternite li rapidis hejmen. Certe Mihok povos klarigi la kialon. Mihok estis puriganta liajn botojn kaj silente malbenadis la ciron, kiu bezonas tiom da kraĉoj. En Eŭropo oni purigas botojn per lakkremo kaj ne devas elspatadi la pulmon por fari la botojn spegulbrilaj. Petroff ekhaltis antaŭ li, iom hezitis kaj fine metis la foliojn antaŭ la nazon de Mihok.

– Kijo estas tijo ĉi?

Mihok iom indiferece rigardis la foliojn.

– Verŝajne gazeto.

Petroff eksplodis. – Nje verŝajne, sed tutje certje... Sed kija, dijru Mihok, kija gazeto?

Mihok eklevis la ŝultrojn, gapis al la folioj, kiujn Petroff minace svingis antaŭ lia nazo.

– Mi ne scias, – konfesis sincere Mihok.

– Vi nje scijas, Mihok, nje scijas? – kriis Petroff kaj kunfrapis la manojn. – Angla gazeto, Mihok, angla gazeto... Nun vi scijas.

Sub la haŭto de Mihok la frostotremo komencis kaŝludon.

– Ne diru, sinjoro leŭtenanto... ĉu vere?

– Sed jes, mi djiras... angla gazeto... Legu! The-London-nje-vs... Mi ne komprenjis eĉ vorton... Legu!

Mihok transprenis la foliojn, rigardis ilin kun terurstreĉitaj okuloj, sed post momento maŝinrapide fluis vortotorento el lia buŝo.

– Enlamondonvenisnovasento...

tralamondoirasfortavoko... perflugilojdefacilavento...

Ĉe Petroff admiro sekvis la koleron kaj dubon.

– Vi scijas legi. Tutje bonje vi scijas legi! Kijel, ke mi nje scijas?

– Vi forgesis verŝajne, sinjoro leŭtenanto, ke la angloj ne tiel skribas, kiel ili parolas. Ekzemple, ili diras: "Bonan matenon, sinjoro" kaj ili skribas "The Szentantalkam, segits meg!" (hungare: Sanktantonĉjo helpu min!) Ĉu vi komprenas? – kaj por konvinki la miregantan leŭtenanton pri sia pravo li serĉis inter la ilustraĵoj unu, kiu figuris ekzotikan tribestron kaj anstataŭ la subbilda teksto li komencis legi la Historion de Homaro el lernolibro de E. Privat. Tion li sciis parkere kaj la teksto, se iom lame, tamen taŭgis: "Kiam la maljuna reĝo de Persujo mortis, lia filo, la juna princo Zemir eksidis sur la tronon..."

Petroff kontentigite foriris. De tiu tago Mihok skrupule atentis la horizonton, ĉu ia anglo ne aperos por renversi ĉion? Tiukaze la leŭtenanta moŝto certe ekspedos lin afrankite al la alia mondo... eble sen kapo. Ĉiutage li promesis novan dekduon da kandeloj kaj pasis longaj monatoj sen notinda okazintaĵo.

Petroff jam bonege parolis la anglan lingvon kaj ankaŭ Mihok rekonis en sia leŭtenanto la ĝeneralan bonkorecon de la rusoj kaj flameman entuziasmon por belo kaj bono. Li decidis konfesi sian kulpon, se venos bona okazo.

Okazo venis, sed ne bona, ĉar homo projektas, Dio direktas. Ĝus kiam li ne estis preparita por eventualaĵoj, venis hejmen Petroff kun fremda rusa oficiro. La malfeliĉa Mihok sentis sian kuraĝon paralizita kiel en la unuaj tagoj.

– Mihok, parolu kun tiu ĉi sinjoro, sed tuj! – komencis Petroff kaj lia voĉo tremis pro la retenitaj kolero kaj indigno. Li asertas, ke li parolas angle...



Parolu kun li angle... Tiun anglan lingvon mi ne komprenas.

La haroj stariĝis sur la kapo de Mihok. Nu Sankta Antonĉjo nun helpu – li komencis preĝi en si, – kvintalon da kandeloj mi bruligos por vi post hejmvreveno. Li klare vidis, ke nun la pentvoĉa konfeso neniel utilos. Se li komencis ĉi tiun altruditan tragikomedion, li devas finludi ĝin. Nur la impertinenteco povas helpi kaj Antonĉjo. Riskante ĉion je unu kubĵeto li ŝajnis trankvilon.

– Kie kaj de kiu lernis la sinjoro tiun ĉi anglan lingvon?

– Ĉi tie, de soldato el la amerika armeo.

– Ah, jes! – Mihok plumblovis sin. La timo, kiel multajn, faris lin aŭdaca en la minutoj de danĝero. Li mem ne konjektis, ke tiom da kuraĝo nestas en li. Kun rideto li daŭrigis. – La sinjoro lernis la amerikan dialekton de la angla lingvo, dum ni parolas la klasikan lingvon de la londona aristokrataro. Jen la diferenco... Je mia Dio, mi tre ŝatus paroli ankaŭ tiun lingvon, sed mi pensis, oni devas scii unue la klasikan, la aristokratan, kaj poste la popolan... ĉu ne, leŭtenanta moŝto?

La kolero de Petroff vaporiĝis, forflugis kaj eĉ aprobe li balancis la kapon. Tre imponis al li la aludo pri aristokratoj. Li interpretis la vortojn de Mihok, sed la fremda oficiro dube ridetis kaj faris demandon. Petroff tradukis.

– Kie oni povas uzi ĉi tiun lingvon ekster la aristokrataj kvartaloj de London, se la popolo parolas alian lingvon?

En Mihok vekigis la propagandisto.

– Ĉie! En ĉiu lando de la mondo! Eĉ en tiu ĉi urbo!! Ĉu vi ne volas kredi? Mi pruvos tion. Bonvolu veni kun mi dimanĉe en la urbon kaj konvinkiĝu, kiu valoras pli: via amerika dialekto aŭ nia klasika angla lingvo?

Petroff denove interpretis kaj ili decidis, ke dimanĉe triope vizitos la urbon.

Mihok sincere ĝojis, sentis sin pli facila, ĉar li estis sur la plej bona vojo malkaŝi ĉion sen fiasko. En la urbo estis granda societo, kie ĉiudimance amase

kunvenis babiladi la esperantistoj. Vera internacia societo: germanoj, bulgarioj, turkoj, hungaroj, japanoj el la diverslandaj armeoj; ĉarmaj virinoj, agrablaj viroj el la urbo mem.

Mihok zorge preparis sin por la publika konfeso. Ĉe la pordego de la domo ankoraŭ unu funto da kandeloj kaj Mihok kondukis sian leŭtenanton kaj la fremdan oficiron en la societon. Ilin surprizis la diversnacieco kaj tiu amika intimeco, kiu kvazaŭ sklavigis la vizitantojn. Mihok prezentis ilin al ĉiu ĉeestanto aparte.

Jen turko, alparolu lin! Jen polo, alparolu ŝin! Jen ĥino, alparolu lin! Jen japano, alparolu lin!

Petroff havis kapturon pro felio, ke li komprenis ĉiujn kaj estis komprenata de ĉiuj. Male lia akompanato, ĉar escepte du amerikanajn soldatojn neniu komprenis lian "dialekton". Li estis devigata rekoni, ke la "aristokrata" angla lingvo superas la popolan.

Kaj Mihok en solena silento publike konfesis sian kulpon, petis indulgon de leŭtenanto Petroff, kiu pro ia neklarigebla sento forgesis pri ĉio ĉirkaŭ si kaj kun vera rusa flamemo li ĉirkaŭprenis sian serviston, kisis trifoje lian buŝon por sigeli la fratecon... Tiel instruis Mihok la anglan lingvon kaj tiel fariĝis Petroff entuziasma samideano.

Tamen la fino de ĉi tiu historio ne estas tre kontentiga. Mihok, kiel bona katoliko, du jarojn laboris por la kandeloj, promesitaj al Sankta Antonio kaj dum tiu tempo la belegan modpupforman Rozinjon edzinigis lia kolego. Tiam li riproĉis iomete Sanktan Antonĉjon, sed kiu scias, ĉu ne la sanktulo savis lin el tiu infero, en kiun la alia falis. Ni scias nur, ke Mihok restis sola kun la revo "fondi la In-Tu-As-Es-Ta-He"-n kun speciala insigno: verda stelo, trapikita per pinglo kaj kudrilo.

de **Julio BAGHY**

Unue aperis en Dancu, marionetoj, Budapeŝto 1927. Ankaŭ en Nova Esperanta Krestomatio, UEA 1991  
Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/noveloj/04.html>

**29>>**

la cindro malpurigis ilian vizaĝon. Ili kuregis por lavi sian vizaĝon. Kiam ili enemetis la manojn la kankro tuj pikis iliajn fingrojn. Ili kaptis la toaletotukon, sed la pingloj kaŭzis teruran doloron. Ili kuregis eksteren, sed la kato saltis al ili skrapante ilin sange. En la korto la alaŭdoj kaj la hirundoj kriegadis:

– Rabistoj! Rabistoj! Kaptu ilin!

La rabistoj ĉiuj forkuregis kaj plurfoje neniam revenis al la domo de la maljunulino.

Matene la kato dankegis la tranoktejon kaj ĝi denove tirigis denove per la kvar musoj la

karotoĉaron. Alveninte sub ponton pro io la musoj ektimis, ili versis la ĉaron en la akvon. Ve, ili ĉiuj tre ektimis. La alaŭdoj kaj hirundoj tuj forflugis. La kato tre malfacile elnaĝis, sed la kankro kun la pingloj restis en la akvo.


Se ĉi tiuj ne restus en la rivero, ankaŭ mia fabelo estus daŭriginta.

Jen la fin', eta porkido portu ĝin!

tradukis **Apáti Kovács Béla** el Hungario

**E**kde hodiaŭ en la novajretejo La Balta Ondo dum la tuta aŭtuno ĉiudimanĉe aperos poemoj el la nova, kvara eldono de la Baza Literatura Krestomatío.

La unua poeto en nia dimanĉa rubriko, nature, estas Ludoviko Zamenhof (1859-1917), kiu verkis la plej fruajn poemojn en Esperanto. Du el ili estas ĉi-sube.



**Agrablan legadon!**

**8 Septembro 2019 de AIKo**

### MIA PENSO

Sur la kampo, for de l' mondo,  
Antaŭ nokto de somero,  
Amikino en la rondo  
Kantas kanton pri l' espero.  
Kaj pri vivo detruita  
Ŝi rakontas kompatante, –  
Mia vundo refrapita  
Min doloras resangante.

“Ĉu vi dormas? Ho, sinjoro,  
Kial tia senmoveco?  
Ha, kredeble rememoro  
El la kara infaneco?”  
Kion diri? Ne ploranta  
Povis esti parolado  
Kun fraŭlino ripozanta  
Post somera promenado!

Mia penso kaj turmento,  
Kaj doloroj kaj esperoj!  
Kiom de mi en silento  
Al vi iris jam oferoj!  
Kion havis mi plej karan –  
La junecon – mi ploranta  
Metis mem sur la altaron  
De la devo ordonanta!

Fajron sentas mi interne,  
Vivi ankaŭ mi deziras, –  
Io pelas min eterne,  
Se mi al gajuloj iras...  
Se ne plaĉas al la sorto  
Mia peno kaj laboro –  
Venu tuj al mi la morto,  
En espero – sen doloro!

### HO, MIA KOR'

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,  
El mia brusto nun ne saltu for!  
Jam teni min ne povas mi facile,  
Ho, mia kor'!

Ho, mia kor'! Post longa laborado  
Ĉu mi ne venkos en decida hor'?  
Sufiĉe! trankviliĝu de l' batado,  
Ho, mia kor'!

Ĉi tiuj poemoj aperis inter la 199 verkoj/fragmentoj de 82 aŭtoroj, publikigitaj en la nova eldono de la Baza Literatura Krestomatío (BLK), kuneldonita de Sezonoj (Kaliningrado) kaj Litova Esperanto-Asocio en julio 2019.

Legu pli pri BLK <http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga121.htm>

Aĉetu ĝin kontraŭ 27 eŭroj en la libroservo de UEA  
Legu pli pri la poezia kreado de Zamenhof en la artikolo de Gerrit Berveling, aperinta en la rubriko Nia trezoro de La Ondo de Esperanto Papere: La Ondo de Esperanto, 2012, №1 (207) kaj en nia novajretejo <http://sezonoj.ru/2011/12/trezoro207/>

Ĝis la sekva dimanĉo!

**AIKo** (Aleksandro Korĵenkov)

Fonto: **La Balta Ondo**

<http://sezonoj.ru/2019/09/zamenhof-23>



**K**ie estis, kie ne estis, mi scias nur tion, ke iam tamen estis kato. La dommastrino estis ege kruela al la kato kaj pro tio ĝi forlasis la domon. Ĝi ekiris por malkovri la mondon.

Por ke mi ne forgesu la rakonton, antaŭ la ekiro sur la strato ĝi trovis sitelon da karotoj, el ili ĝi faris ĉaron, poste ĝi kaptis kvar musojn per kiuj ĝi tirigis la veturilon. Tiel ĝi ekiris.

Ĝi iris, iradis, kiam ĝi renkontis kankron.

— Kien vi iras? — demandas kankron.

— Mi iras malkovri la mondon.

— Bonvolu kunporti ankaŭ min, ĉar la fiŝoj pelis min el la rivero.

— Kial ili pelis vin el la rivero.

— Pro tio ĉar mi pikadis ilin per mia tondilo.

— Nu, venu kaj sidiĝu sur la ĉaron apud min.

Ili iris plu kaj meze sur la vojo ili ekvidis du ovojn. Iu ovo demandas la katon:

— Kien vi iras?

— Mi iras por malkovri la mondon.

— Bonvolu kunporti ankaŭ nin, ĉar nia dommastrino devigis nin, ke el ni naskiĝu tri kokidoj.

— Bone, sidiĝu sur la ĉaron!

La ovo sidiĝis sur la karotoĉaron kaj ili iris plu.

Subite dek hirundoj kaj dek alaŭdoj flugis sur la ĉaron.

Ili ne petis permeson de la kato. Ankaŭ ili veturis kun la novaj amikoj. Ili apenaŭ iris kelkajn metrojn, ili ekvidis sur la vojo kelkajn pinglojn.

La kato demandis scivole:

— Kial vi staras ĉi tie?

— Do, iu el ni pikis la fingron de nia dommastrino.

Ŝi koleriĝis kaj ŝi ĵetis nin ĉiujn ĉi tien.

— Ankaŭ vi sidiĝu sur la ĉaron kaj venu kun ni! — proponis la kato al la pinglojn.

Ili iris plu kaj vespere alvenis al dometo. En la dometo loĝis maljunulono. La kato eniris kaj dece salutis ŝin. Ĝi petis tranoktejon por ĉi nokto.

— Volonte mi donas al vi tranoktejon — diris la maljunulino, sed sciu, ĉiunokte ĉi tien venas rabistoj kaj pro ili vi ne havos trankvilon. Fine la kato konvinkis la maljunulinon, ke ili ne timas de la rabistoj. La kvar musoj ricevis lokon en la stalo. La du ovoj sidiĝis en la varmegan cindron. La kankro ensaltis en akvuĵon, la pingloj trovis lokon en la toaletotuko, la kato kuŝiĝis ĉe la pordo, la hirundoj faris neston sub la defluilejo kaj la alaŭdoj flugis sur la tegmenton de la dometo.

Nokte efektive alvenis la rabistoj. Ili sidiĝas apud la fornjon por fari fajron. Kiel ili ekmovigis la cindron la du varmegaj ovoj tuj eksplodiĝis timigante la rabistojn kaj



&gt;&gt;27

## Scivolulo

## fablo de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

Saluton, kamarad'! De kie venas vi?"

"Mi estis en muze', en Urba Galeri',  
Kaj ĉion por rigard' mi vidis en detalo.

Pri tuta valoraj' en ĉiu halo,

Rakonti eĉ ne povus mi.

Jen mirindaĵ' ĝuiga por plezuro!

Mirakla estas verk' donita de naturo!

Impreson havis mi de ĉiu animal'!

Kaj kia diversaĵ' — jen kraboj,

Muŝetoj, kuloj kaj skaraboj,

Similaj al smerald', alij — al koral'!

Kaj nur imagu vi pri eta kokcinelo, —

Mezur' — je pingla kap', ekstero — laŭ juvelo!"

"Kaj kiel elefant' aspektas en la hal'?"

Ĝi kvazau mont' verŝajne sin prezentis?"

"Ĉu tie estis ĝi?" — "Nu certe", — "En real'

La elefanton mi tutplene ne atentis."

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio

tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)





## Tragedio pro la atombomboj

**J**apanio estas la sola lando, kiu suferis pro atombomboj, tial multaj japanoj opinias, ke Japanio devas gvidi la mondon al sennuklearmila mondo, ratifante “la Pakton pri malpermeso de nukleaj armiloj” adoptitan en la Unuiĝintaj Nacioj la 7an de julio 2017.

Tiu pakto estis malfermita por subskribo la 20an de septembro 2017 kaj post ratifado de 50 ŝtatoj ĝi ekfunkcios. Antaŭ la 28a de februaro 2018, 56 ŝtatoj subskribis, el kiuj 5 ratifis ĝin. Sed strange Japanio rifuzis subskribi la pakton kun jena preteksto:

*“Japanio estas la sola lando, kiu suferis pro la atombomboj, tial ĝi havas la komunan celon aboli nukleajn armilojn. Tamen aliflanke Norda Koreio ekspluatas nukleajn armilojn, kaj tio estas tre serioza kaj urĝa minaco al paco kaj stabilo de la internacia mondo. Al la landoj kiel Norda Koreio, ordinara armiloj ne efikas, tial Japanio bezonas subtenon de Usono, kiu posedas nukleajn armilojn, sub la koalicio inter Japanio kaj Usono.*

*Se Japanio tuj ratifos la pakton, kiu malpermesas nukleajn armilojn, tio damaĝos justecon de la nuklea politiko de Usono kaj danĝerigos la vivon de la japanoj.* “

Kontraŭ la japana registaro multaj homoj protestas. Precipe tiuj, kiuj postvivis la atombombadon en aŭgusto 1945, forte deziras, ke Japanio ratifu la pakton. Hodiaŭ mi tradukos spertojn de atombombitoj en Hiroŝima kaj Nagasaki el artikoloj aperintaj en ĵurnaloj.

verkita kaj tradukita de **Hori Jasuo** el Japanio

### 1) Blanka lumo kuris tra la lerneja sportejo



*verkita de s-ino Jamada Reiko naskiĝinta en 1934, nun loĝanta en Tokio, tradukita el la ĵurnalo Akahata eldonita la 4an de decembro 2017*

Je la 8a horo la 6an de aŭgusto 1945, mi, 11-jara lernantino, estis en la sportejo de la elementa lernejo Koi kun aliaj gelernantoj. Mi vidis aviadilon fluganta alte kontraŭ la blua ĉielo.

## verkis kaj tradukis Hori Jasuo, el Japanio

“Belege!”

Ĝi ekrevenis, kaj tiun momenton blanka lumo trakuris la lernejan sportejon, kaj tuj poste venis eksploda ventego. Sablo trafis nin. Ni kuregis al la ŝirmejoj laŭ la monteto. Jam ili estis plenaj de homoj, kaj multaj staris ekstere en la nigra, nuklea pluvo.

Kiam mi revenis hejmen kun mia pliaĝa fratino, mi renkontis multajn vunditojn. Lu virino vokis la nomon de mia fratino, sed ŝi estis tiel nigra, ke mi ne povis rekoni, kiu ŝi estas, kaj ni forkuris. Ankoraŭ nun mi demandas min pri tio kaj bedaŭras pro mia ago.

Mia amiko perdis sian patrinon. Kiam ŝi hejme atendis la patrinon kun siaj 4 gefratoj, en la venonta tago enkuris nigra maso en la domon. Ŝi pensis, ke ĝi estas nigra hundo, sed ne. Ĝi estis ŝia patrino. Ŝi falis tie kaj tuj mortis. Ili bruligis ŝian kadavron en la ĝardeno.

Post 3 tagoj de la katastrofo oni komencis kolekti kadavrojn kuŝantajn ĉie sur la stratoj kaj bruligis ilin en la sportejo de la elementa lernejo. Oni diras, ke ĉirkaŭ 2300 kadavroj estis bruligitaj kiel sennomuloj. Mi ne forgesas voĉojn de la vunditoj. Tiu memoro obsedas min.

Mia patro estis bombita en la konstruaĵo unu kilometron for de la epicentro. Li estis savita el la detruitaĵoj, sed lia korpo estis kovrita de sango kaj vitraĵpecetoj. Poste el lia korpo aperadis tiuj pecetoj, kaj post 20 jaroj li suferis pro pluma kancero kaj leŭkemio, kaj mortis kun oftaj spasmoj.

Mi komencis rakonti pri mia sperto, sciante, ke multaj homoj suferas pro la sekvaĵoj de la atombombado. Mi rakontis ne nur en Japanio, sed ankaŭ en eksterlando. Mi renkontis eĉ nepon de tiama usona prezidento Truman, kiu ordonis la uzon de atombomboj sur Japanio. Mi rakontis ankaŭ al lernantoj en Usono. Ili larmis kaj diris al mi, “Usono faris teruran aferon al la japanoj. Estas certe, ke ili malamas Usonon”. Mi respondis, ke ni ne malamas Usonon, sed malamas nukleajn armilojn. Tiun momenton revenis al ilia mieno ridetoj.

Mi volas, ke ĉiuj sciu, kio okazis en Hiroŝima tiun tagon kaj pro kia malfacilo la atombombitoj suferis poste, kaj ke la nukleaj armiloj estas tiuj de diablo.



u fabrikanto de plugiloj instalas sian atelieron ĉe vojrandoj.

- Vi devas fabriki ilin en grandaj dimensioj, al li konsilas iu pasanto. Estos pli facile manteni ilin.

Li sekvas la konsilon. Anstataŭ lin aprobi, la dua pasanto faras dikan lipon:

- Tio estas tro granda! Oni bone plugas nur per malaltaj plugiloj kun mallonga mantenilo.

La metiisto senprokraste reduktas la dimensiojn de sia ankoraŭ ne finfarita plugilo.

- Puf! - diras la tria pasanto. Forĵetu tiun ridindan ludilon! Vi ne scias do, ke nun, por kulturebligi

arbarojn, la modo estas plugi kun elefantoj? Do fabriku plugilojn adaptigeblajn al ilia staturo!

La fabrikanto elĉerpas sian tutan stokon da ligno por tajli elefant-plugilojn. Poste li atendas la fortunon.

Sed, li vane atendas. Neniu aĉtas liajn gigantajn pecojn. La elefantoj ŝajne estas nur trompsciigo: la ligno putriĝas, kaj liaj instrumentoj fariĝas tute taŭgaj por doni fajraĉon.

Eltiraĵo el **Ridi Vjetname**, eldonita en 1981 de Fremdlingva Eldonejo.

Fonto: <http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/ridi-vjetname/la-konsilantoj-ne-estas-la-pagantoj/>

**Vortareto**

- \* **ateliero** - speciala ĉambro, kie laboras artistoj, ekzemple pentristoj, skulptistoj kaj similaj.
- \* **konsili** - diri al iu, kion oni opinias, ke tiu devas fari.
- \* **ligno** - la malmola, fibra substanco, el kiu konsistas la plejparto de la radikoj kaj branĉoj sub la ŝelo de

arboj kaj arbedoj kaj iomkvante da arbustoj.

- \* **metio** - manlabora profesio, precipe hejme aŭ etindustrie praktikata.
- \* **plugi** - prilabori la teron, tranĉante ĝin per speciala ilo por prepari semadon kaj kulturon.
- \* **stoko** - kvanto da varoj, krudmaterialoj aŭ fabrikitaĵoj, disponeblaj en magazeno aŭ deponejo.

32>>

Benjo kaj mi plu promenadis. Ni vidis iun, kiu estis laŭte deklamata. Sur sia vendobenko li havis kapon de moruo, kaj sur ĝi estis grandeta pilolo diskoforma.

„Gesinjoroj,“ li deklamis, „rigardu la muŝojn! Ili estas ĉie sur la stando, sed neniu – eĉ ne unu sola – alproksimiĝas la fiŝkapon. Jen unu pundo! Tion mi volonte donos al iu ajn, kiu unua vidos muŝon resti sur la fiŝo. Gesinjoroj, tiu pilolo ŝirmos vian manĝaĵon kontraŭ muŝoj kaj ĉiuspecaj insektoj. Nur metu unu en vian kuirejon aŭ manĝoŝrankon kaj vi forigos la danĝeron kuin portas muŝoj. Muŝoj infektas... .. ktp.“

Ni formoviĝis. Neniam antaŭe mi vidis tiun pilolon, sed mi aŭdis pri ĝi. Laŭdire oni simple fandas kandelojn kaj muldas la fandaĵon je pecoj de iu ajn formo. Kelkfoje oni koloras la fandaĵon per blua aŭ ruĝa inko. La muŝoj ne proksimiĝas al la fiŝo, sur kiu estas la pilolo, ĉar la fiŝo estas ..... antaŭe trempita en petrolon.

La libron en la ĉeĥan tradukis **J. Drahotová**.

*Solvo de la krucvortenigmo*



PRO	VER	BA	RO
KU		UR	SO
VA	STA		KUR
FLA	KO	NO	
	SEN	SO	RO
BLI		PER	LA
TA	KO		BE
ES	PE	RAN	TA

## Ero el la libro: „Kredu min, sinjorino!“

Cezaro Rossetti

Iun dimanĉmatenon mi renkontis Benjon laŭ antaŭaranĝo, por viziti Petticoat Lane, la faman Londonan bazon. Estis bela, varma mateno. Ni atingis Petticoat Lane proksime de la deka. La bazo estis tiom plena de homoj, ke ni devis puŝiĝi inter ili kaj zorgi por ne perdi unu la alian. Ĉiu strato estis kontinue borderita ambaŭflanke per standoj, kaj ankaŭ la stratbutikoj estis malfermaj. La bazaristoj hurlis pri siaj varoj, kaj la butikistoj staris ĉe la sojlo, provante per ĉiu rimedo enirigi klientojn. Preskaŭ ĉiu speco de varo estis aĉetebla, „de pinglo ĝis ankro“, kiel diras la angla esprimo.

Ni kuniris malrapide, aŭskultante la bazaristojn deklami. Inter ili mi rekonis kelkajn bazarulojn, kaj kelkfoje mi agis kiel „sprono“ por ili. „Sprono“ estas proksimuma traduko de bazarula vorto, kiu signifas iun, kiu per ekzemplo instigas la klientojn aĉeti. Necesas nur, ĉe la fino de bazarula parolo, kiam li diras prezon, ke mi tuj aĉetu. Tio komencigas la aĉetadon. Poste mi redonas kaŝe la aĉetaĵon kaj ricevas monon.

Ĉe la vojrandoj staris viro, kiu vendis faskojn da mento. Dum mi preterpasis, li ŝovis la faskon al ni, kriante: „Mento po du pecoj por fasko, mento po du pecoj por fasko!“, riripete. Ĝuste tiam, terno neatendite skuis Benjon, kaj ŝi ternis rekte sur la etenditan faskon. La mentvendanto ne paŭzis nek movis eĉ palpebron, sed daŭrigis: „Mento po unu peco por fasko, unu peco por fasko...“

Ni puŝiris laŭ la stratoj. Benjo interesiĝis pri virinaj vestaĵoj kaj faris du-tri aĉetojn. Inter ili estis paro da silkaj ŝtrumpoj, kiuj estis malaltprezaj. La bazaristo montris ilin al ŝi, turnante ilin en mano, por ke ŝi bone vidu ilin. Ŝi poste rimarkis, ke la fortikigita kotona rando ĉe la supro de unu etendiĝas preskaŭ ĝis la genuo.

Ankoraŭ ŝi ne scias, kiel ili estis manipulitaj, ke ŝi ne vidis la okulfrapan difekton.

Subite Benjo diris: „Kion vendas tiu hindo?“ Mi rigardis. Li ne estis hindo. Tio estis videbla. Li estis ŝminkita. Ni alproksimiĝis. La „hindo“ portis pseudo-

orientan vestaĵon, sidis sur tapiŝo kun la kruoj krucitaj kaj diris monotone per kvazaŭ-fremda fuŝparolo: „Bonŝanca nigra fabo, faras bonŝance, multe bonŝance, nur po tri pecoj.“ Li tenis la rigardon teren kaj apud li estis cizelita latuna pleto plena de nigraj faboj. Li vendis unu-du tiam kaj tiam, precipe al virinoj. Dum mi rigardis, mi trovis ion konatan ĉe li, kaj mi rekonis lin. Estis Bert, la „specimenisto“, kiun mi renkontis en Edinburga foiro. Post momento li leviĝis kaj aĉetis tason da teo ĉe apuda stando. Mi alproksimiĝis: „Kaisa hai, sahib, granda ŝanĝo post la specimenvendo!“



„Jock!“ li diris. „Kiel vi fartas? Kio logis vin al ĉi tiu ĝangalo?“

„Ĉio iras glate ĉe mi. Kiel ĉe vi?“

„Ho, kiel kutime, enspezo kaj elspezo.“

„Ĉu tio estas via nova entrepreno?“

„Ne, mi laboras ĉe foiro dum semajno, kaj se la vetero estas afabla dimanĉe matene, mi venas ĉi tien.“

„Ĉu vi multe enspezas per faboj?“

„Ne multe, sed la kosto de la faboj kaj iom da tinkturo ne estas multo.“

„Mi certe ne estus kredinta, ke oni aĉetus fabojn unuope, kaj je tia skandala prezo!“

„Ho, la publiko aĉetas iom ajn. Ju pli trompa la varo, des pli oni aĉetas. Tamen estas io, kio igas la fabojn karaj.“

„Kio?“ mi demandis.

„Mia pluso,“ li respondis. „Kiam mi komencis, mi provis fari paroladon pri la faboj, sed eltrovis ke la publiko ne kredas min. Ĝi estis bona ‘fabelo’: pri la deveno de la misteraj nigraj faboj kaj citoj pri la granda bonŝanco, kiun ili venigas, sed – nenio: do mi decidis provi diri nenion, krom fuŝdiri kio ili estas. Kaj la homoj aĉetas. Eble ili iom hontis, kiam ili estis inter amaso, kiun mia parolado kolektis. Ĉu aŭ ĉu ne, - ili aĉetas unuope.“

„Vi havas pli da kuraĝo ol mi. Mi ne kuraĝus tion fari, precipe se mi havus helbluajn okulojn.“